

# Turka Stelo



## SALUTON,

La kronviruso pandemio furoras tra la tuta mondo. En multaj landoj la alvenon de la kvara ondo oni jam atestas.

Sed ne nur la pandemio estas nia nura problemo. Ĉi jare naturaj katastrofoj ankaŭ furoras tra la tuta mondo. En Usono firegoj, en Eŭropo kaj Azio inundegoj okazas. La temperaturoj multe altiĝis. Nuntempe en centra Eŭropo o ondo de varmego.

La 68-a numero de nia revuo Turka Stelo nun estas en viaj manoj. Denove estas interesaj tekstoj en ĉi tiu numero:

- ni komencis publikigi la konkursaĵojn de EKRA 2021 konkurso.
- ni konatigas al vi la novan reĵurnalon GLOBOBS
- ni komencas publikigi artikolojn el la UEA.FACILA.ORG retejo
- kaj multajn aliajn interesajn artikolojn vi trovos en ĉi tiu numero
- la seriaj tekstoj daŭras: La Kimero, La greka

mitologio, Bildoj el la esperanta literaturo, La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj k.a.

- poeziaĵoj el diversaj landoj, ŝercoj, krucvortengimoj
- ktp

Bonvolu resti hejme, vakciniĝu (se vi ne estas kontraŭ la vakcino), atentu la socian distancon kaj portu maskon. Ni scias ke la vakcino kreas antikorpojn kontraŭ la viruso en nia korpo kiel ĉiuj aliaj vakcinoj kaj helpas batali kontraŭ la viruso. Sed ni ne scias al kio estas kapabla la kronviruso kaze, ke vi kaptos ĝin.

La legado de nia revuo helpas al vi teni vin hejme malproksime de la kronviruso.

**Bonan legadon al ĉiuj !**

## Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Nova retejo por Turka Stelo	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Ciklo kun Hori Jasuo	4
Tempo Sigelita	5
KADMO (ΚΑΔΜΟΣ)	6
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	8
La Kimero - Rakonto el la estonteco (15)	10
El la literaturaj paĝoj de MAS	11
BOHDANA JEHOVA Poezio	13
Kato kaj Ezoko	14
Giuseppe Belvedere, eble la paradigmo de la kontraŭfaŝismo?	15
Unu jarcento kaj unu...	17
Ŝercoj	19
Krucvortenigmo	19
Mirinda renkonto (10/10)	20
Mi, Sonorilo	21
La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj (4)	21
Denove EKRA en Razgrad	23
EKRA2021 - Pro la Najlo	24
La Reĝo de Koregonoj	25
Kiel mi lernis mortigi homojn	26
Fernando Maia pretas plu gvidi UEA-n	28
GLOBOBS - Nova esperanto reĵurnalo	30
Facilaj artikoloj el UEA.FACILA.ORG retejo	31
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32

## Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj. Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo.

Ekde la 22-a de novembro ni komencis serion de retaj kursetoj, ĉiu 30 minutojn longa, ĉiusemajnaj, pere de google.meet, pri diversaj gramatikaj punktoj de Esperanto. Temoj kaj iliaj planitaj datoj estas la jenaj:

- 22/11 Akuzativo
- 29/11 Transitiveco
- 06/12 Participloj
- 3/12 Korelativoj
- 20/12 Prepozicioj
- 27/12 Sufiksoj
- 03/01 Refleksiva pronomo: Si

<https://edukado.net/kursejo?kid=27268>

## Nova retejo por Turka Stelo

Turka Stelo revuo nun havas sian propran retejon!  
<https://TurkaStelo.wordpress.com>

### Turka Stelo

Iam la revueto de la turka esperantistaro,  
nun la revuo de la monda esperantistaro

n-ro 061  
julio 2021

La revueto de la turka esperantistaro

# Turka Stelo

Por elŝuti la diversajn numerojn de Turka Stelo,

- Surkalku sur la numeron de via dezirata formato ("pdf", "ePub", aŭ ".mobi") en la suba tabulo. Tiu ligilo vin alkondukos al la arkivo, kiu troviĝas ĉe "Mega.nz" servilo en Nov-Zelando.
- En la malfermota paĝo surklaku sur la butonon "Download" kaj elŝutu la revuon en vian komputilon.
- Poste vi povos malfermi la pdf dosieron en via komputilo kaj legi ĝin. Se vi elŝutis la ePub aŭ .mobi formaton bonvolu movi ĝin unue en vian e-libro-legilon kaj legi ĝin tie.

Pli da informoj troviĝas sub la tabulo...

2016.01	#1 pdf		
2016.02	#2 pdf		
2016.03	#3 pdf		

## Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.*

## Esperanto-Sumoo



Karaj,

En la korona erao Esperanto-Sumoo estas la plej bona rimedo por

lernado kaj movado de Esperanto. Tuj sendu vian aliĝon al mi. Baldaŭ la julia sumoo (la 70a Sumoo) komenciĝos la 4an de julio (du semajnoj). Mi atendas vian aliĝon.

Sendu jenajn datumojn:

1. Viaj sumoo-nomo kaj vera nomo kun sekso
2. Libro, kiun vi legos (1) Titolo (2) aŭtoro (3) eldonejo
3. Kiom da paĝoj vi legos por unu tago

Mi atendas aliĝon de tiuj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis.

### HORI Jasuo

371-0825 Japanio, Gunma,  
Maebaŝi, Ootone 2-13-3  
Retadreso: [horizonto@r.water.sannet.ne.jp](mailto:horizonto@r.water.sannet.ne.jp)

-----

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia\\_Esperanto-Sumoo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo)

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

## UEA



N-ro 969 (2021-07-25)  
14 elstaraj agantoj diplomitaj dum la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto [...]

N-ro 968 (2021-07-23)  
Kontakto havas novan redaktoron [...]

N-ro 967 (2021-07-20)  
Kampanjo Hans Bakker de la Afrika Komisiono de UEA [...]

N-ro 966 (2021-07-19)  
Aliĝilo kaj temo de la 107-a UK (Montrealo): "Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj" [...]

N-ro 965 (2021-07-18)  
La 2-a Virtuala Kongreso malfermiĝis kun bunta programo kaj salutletero de Unesko [...]

N-ro 964 (2021-07-05)  
UEA invitas vin partopreni en la kampanjo por konvinki Uneskon deklari la "Internacian Tagon de Esperanto" [...]

N-ro 963 (2021-07-04)  
Biblioteka Apogo Bachrich 2021: limdato prokrastita al la 31-a de julio 2021 [...]

N-ro 962 (2021-07-03)  
Alvoko al Kunmanĝado tra la Mondo kadre de la 2-a VK, la 21-an de julio, 2021, 15h-17h UTC [...]

N-ro 961 (2021-07-02)  
Malfermiĝas hodiaŭ la Virtuala SES 2021, aŭspiciata de UEA [...]

N-ro 960 (2021-07-01)  
Alvoko por la Oratora Konkurso kadre de la 2-a Virtuala Kongreso [...]

## TEJO



05/07/2021

**Iĝu TEJO-**  
**volontulo en la**  
**Centra Oficejo en**

### Roterdamo (2021-2022)

Kadre de la Eŭropaj Solidaraj Korpusoj (antaŭe Eŭropa Volontula Servo) TEJO, la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, invitas vin por iĝi plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. Esti volontulo signifas ne nur grave kontribui al la bonfarto de... [...]

03/07/2021

### KODEJO 2020

La Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj (KODEJO) 2020 estas pretaj! Ĉu vi estas landa aŭ faka sekcio de TEJO, nealiĝinta junulara organizo, aŭ landa referencpunkto? Kiel statis kaj evoluis via organizo en 2020? Kiel efikis la pandemio sur... [...]

01/07/2021

### Daŭripoveca Teamo

La Plano de TEJO pri Daŭripoveco: kontribuu ankaŭ vi! Antaŭ nelonge TEJO ekis la kreadon de plano pri daŭripoveco, kiu celas ellabori paŝojn por daŭripovigi ĉiujn agadojn de nia organizo. Tiu plano estas paŝo-post-paŝa laboro, en kiu ankaŭ vi... [...]

## Leteroj de niaj legantoj



Est-ata,  
Dankon denove pro via ĉiam atentinda  
revuo. Je la fino de la monato mi ĉiam serĉas  
ĝin; ĝi eniris mian legindan kalendaron.

Jen eĉ ĉifoje mi sendas alian poemeton.  
Dankon pro via pacienco.

Mediterranean saluton.

**Carmel Mallia** el Malto



Multegaj dankoj pro ĝi!  
Elkore,  
**Adri Pasztorlaszlo** el Hungario



Elkoran dankon kara,  
ankaŭ je la nomo de la verkisto Zija Ĉela.  
Amike  
**Bardhyl Selimi** el Albanio



Ege bela!  
Gratulon kaj dankegon.  
**Gairik Patranobis** el Barato



Dankon,  
Mi estas komencanto, kaj mi amas la  
Revuon.  
**Daniel Pereira** el Brazilio



Saluton estimataj.  
Mi elkore dankas pro la nova, julia numero  
nr.067 de Turka Stelo. Ĝi kiel ĉiam estas  
enhave riĉa, temoabunda kaj interesa. Mi  
volas rimarki, ke la subtitolo "La revueto de la turka  
esperantistaro" jam ne plu validas. Ĉar aŭtoroj de  
artikoletoj nome en la lasta numero de TS reprezentas  
20 landojn kaj eĉ kvar kontinentojn. Oni kuraĝe povas  
diri, ke Turka Stelo estas internacia eldonaĵo kun  
internacia legantaro kaj verkantaro. Sukceson en via  
nobla laboro. Mi proponas plian mian rakonton "Pro la  
najo", ĝuu ĝin legante.

Amike

**Laimundas Abromas** el Litovio



Koran dankon pro la sendaĵo.  
Helga Plötner nepre rekomendis al mi legi  
vian revuon, kion, mi ĉiuokaze faras kun  
granda scivolemo kaj plezuro

Amike,

**Franciska Toubale** el Aŭstralio



Karaj, Gratulojn pro via sukcesa Turka Stelo!  
Jen specialan hajkon:  
*Japanio - jes!*  
*Pandemio sufiche!*  
*Olimpiado!*

**Peter Todorov** el Bulgario

## Ciklo kun Hori Jasuo

## -- hajkoj kaj poemetoj de Elena Popova e Bulgario

Manĝu sen pensi  
la tomatojn de l' natur',  
kun olivele'.  
Sekreton por sano en  
si la tomatoj kaŝas.




Ĉiama memor' .  
Pacon al la animoj  
de l' antaŭuloj!



Kormoran' pensas:  
"Ĉu l' akvo estas pura?"  
Bluas la akvo.  
Post labor' sub la suno  
la plumojn ĝi sekigas.



Ĝardena floro -  
Alceo, aŭ Aoi ,  
ĉe ni konata.  
Simbol' en Japanio  
dum iuj festotagoj.



"Mi pardonpetas!" –  
diras la Hortensio,  
laŭ la legendoj.  
Kiel vera princino  
ĝi preferas la ombron.



La Garrulakso –  
enmigranto traflugas  
limojn por trovi  
novan domon. La gasto  
kantas nun en Japani'.



KINO AFORISMOJ (ELDIRAĴOJ)



Kino: Bildotemplo plena je senfinaj ikonoj.

\*\*\*

Blanka Kurteno: La tuko sur kiu varmaj korpoj amoras.

\*\*\*

Projekciilo: La Lampo de la Fratoj Lumière kaj Edison, kiu elĵetas sennombrajn demonojn el ĝi.

\*\*\*

Kino: Li estas la nepo de la Ombra Teatro, la nepo de kalejdoskopoj, infano de la lanterno magia.

\*\*\*

Fotilo: Kopiisto de lokoj, objektoj, entoj.

\*\*\*

Kamerao: Vida plumo de la 20-a jarcenta historio.

\*\*\*

Direktoro de bildo: La magiisto, kiu empreniĝas lokon kaj lumon en skatolon.

\*\*\*

Reĝisoro: La rakontanto, kiu kreas rakontojn per moviĝantaj bildoj. La fabelisto de bildoj.

\*\*\*

Aktoro: Ŝamano, kiu faras mirindaĵojn per sia vizaĝo.

\*\*\*

Aktoro: Mortulo en loko, senmorta homo sur filmo.

\*\*\*

Aktoro: La spegulo de amo, volupto, perforto, beleco kaj feliĉo.

\*\*\*

Aktoro: Komikulo, kiu tiklas sen tuŝi, tiras ridojn el niaj buŝoj per nevidebla ŝnuro.

\*\*\*



Dublanto: Heroo kiu rezignis pro sia reputacio.

\*\*\*

Asistanto: Mano kaj brako de direktoro, tiu, kiu elprenas lian ŝarĝon.

\*\*\*

Sceno laboristo: La konstruistoj de la vidaj piramidoj.

\*\*\*

Kostumisto: Ornamista de korpoj. Pesilo de vesto.

\*\*\*

Sceno dekoraciisto: La pentristo de la loko, precipe en historiaj filmoj.

\*\*\*

Produktanto: La persono, kiu frakasas la sonĝojn de la reĝisoro. La viro, kiu rigardas en la poŝojn de la spektantaro antaŭ ol la skripto.



Magiisto kaj la unua kreema reĝisoro de kino:  
Georges Melies

\*\*\*

Manuskriptisto: La unua rakontisto. La persono, kiu verkas la tekstojn, kiuj iĝos bildoj.

\*\*\*

Manuskriptisto: La unua posedanto de la revelacio, sed la persono, kies nomon oni ne aludas apud la profeto reĝisoro.

\*\*\*

Manuskriptisto: Foje, same kiel la reĝisoro mem.

\*\*\*

Manuskriptisto: Homo, kiu aspergas sonĝojn sur blankan paperon.

\*\*\*

Kritikisto: Filma babilulo. Vida ĉiosciulo.

\*\*\*

Kino Historiisto: Gardanto de la tombejoj de sonĝoj.

\*\*\*

Kino Historiisto: Arkeologo de senfinaj bildoj.

\*\*\*

Interreto: La senfinaj surskriboj de la Religio de Kino...

\*\*\*

**E**n la mondo de la mitoj, sed ankaŭ en la historia realo, distingiĝas figuroj de herooj brilaj, kiuj restas porĉiame en la memoro de la popoloj kaj iĝas punktoj menciindaj en la eterna fluado de la monda evoluo.



Mi ne pensas pri pensuloj, filozofoj, religifondintoj, elpensintoj k.s., sed pri popolpatroj, ŝtatestroj, politikuloj. Plej ofte, tiaj herooj estas gloraj militestroj, mond-konataj konkerantoj, viroj kies komuna plej distingita eco estas la forto, la potenco kaj la perforto.

Tamen, estas malmultaj plej brilaj herooj, kiuj distingiĝas ne per la forto, sed per la saĝeco kaj bonfaremo, kaj ŝajnas, ke la perditaj en la plej fora profundo de la homa itinero kreintoj de la helenaj mitoj, la ordinaraj homoj de ĉiuj epokoj, eble admiras, kiel ĉiam okazas, la fortulojn, tamen, kiel fondintojn de siaj gentoj kaj ŝtatoj, preferis heroojn diferencajn, ili kreis figurojn de saĝuloj, de enkondukintoj de civilizo kaj sociklerigo.

Nu, el inter tiaj herooj mi eltiras la mitan fondinton de Tebo (Θήβα), de unu el la plej grandaj kaj gloraj antikvaj helenaj ŝtatoj.

En Fenicujo (Φοινίκη) vivis iam iu reĝo nomata Agenoro (Αγήνωρ), kiu estis naskita en Egiptujo kaj estis filo de la dio Pozidono (Ποσειδών) kaj de la nimfo Libia (Λιβύη). Tiu Agenoro akiris tri filojn, Kadmon (Κάδμος), Fenikson (Φοίνιξ), kaj Kilikson (Κίλιξ) kaj unu filinon, European (Ευρώπη). La reĝo amis tre varme sian solan filinon, kaj kiam, forrabita de Zeŭso (Ζεὺς), ŝi malaperis, Agenoro, ne povante elteni la fatalaĵon, kaj ne sciante, ke forrabinto estas la reĝo de la dioj, li vokis siajn tri filojn kaj ordonis ilin tuj foriri kaj serĉi ĉie en la mondo sian fratinnon. Li donis la ordonon kaj li klarigis, ke estos malpermesite al ili reveni al la patrujo sen la perdita junulino.

La tri junuloj, akompanataj de malmultenombra sekvantaro, foriris, ĉiu el ili al alia direkto, ili longe vagadis tra Helenujo kaj iris tra la konata barbara mondo, sed ili ne trovis sian fratinnon. Kadmo, viro tre saĝa, kuraĝa kaj pia, trairis kaj esploris la tutan

helenan landon, eĉ la insulojn, kaj en ĉiu loko kiun li atingis, li ion oferis el siaj scioj kaj povoj, precipe li alportis al la homoj la fenicajn literojn, el kiuj elvenis la helena alfabeto. Li ankoraŭ organizis civitojn, li fondis templojn, li instruis artojn, tiele li postlasis ĉie siajn memorindajn spurojn. Trairinte la tutan Helenujon, de la sudo ĝis la nordo, fine li atingis Trakion (Θράκη), kie li restis pli longe. De tie, unu el liaj kunuloj, nomata Taso (Θάσος), decidis enloĝiĝi kun kelkaj ankoraŭ sekvantoj de Kadmo en proksima insulo, sur kiu li fondis civiton. De tiam la bela insulo ricevis la nomon de Taso.

En Trakio Kadmo eltrovis la oron kaŝitan en la subgrundo de la monto Pageo (Παγγαίον) kaj montris al la Trakanoj la manieron kaj la teknikon de la elfosado de la metalo kaj de la produktado de oraj ornamaĵoj kaj artaĵoj.

Foririnte de Trakio kaj sciante ke li jam estis trairinta kaj esplorinta la tutan Helenujon, li direktiĝis suden, li atingis la centran Helenujon kaj li decidis viziti la divenejon de Apolono (Απόλλων), en Delfoj (Δελφοί) por peti orakolon kaj konsilon de la dio. La akceptita orakolo certigis lin, ke li neniam trovos sian fratinnon, ke li devas ĉesigi la serĉadon, sed daŭrigi sian vagadon, ĝis kiam li renkontos bovinon liberan, neniam juĝitan, kiu havas sur sia flanko signon de blanka cirklo. Laŭ la orakolo, Kadmo kaj liaj sekvantoj devis ne ĝeni la beston, sed nur de malproksime sekvi ĝin, ĝis la punkto, sur kiu ĝi haltos kaj kusiĝos. Do, la konsilo - ordono de la dio estis, ke ekzakte en tiu loko, Kadmo devas definitive halti kaj fondi urbon, sian novan patrujon.

Efektive ĉio tio ĉi tiele okazis, la bovino estis renkontita, sekvita, kaj en la loko kie ĝi kusiĝis, Kadmo haltis. Unue li sanktoferis la disenditan bovinon al la diino Atena (Αθηνά) kaj tuj poste li komencis skizi la planon de la konstruado de la nova civito. La solena sanktofero estis ne hazarde oferita al Atena; tiu diino, diino de la saĝeco kaj inteligenteco, ĉiam favoris kaj protektis Kadmon, kiu, inspirite de ŝi, dum la tuta sia multjara vagado, malavare disdonis al la homoj utilajn sciojn kaj kapablojn.

Do, sub la dia protektado, Kadmo kaj liaj, ne tre multaj, kunuloj komencis la malfacilan laboron. Ili elektis la taŭgajn ebenaĵojn, ili komencis per la loĝlokoj, sed ili ankaŭ priserĉis la plej fekundan grundon, taŭgan por kultivado. Kompreneble ili bezonis abundan akvon kaj tio, en la komenco, ŝajnis al ili tre facila afero, ĉar tre apude al la elektita grundo eliĝis abunda akvo el fonto kiu estis nomata Aresa (Αρεία). Tamen, kiam la



viroj de Kadmo provis fari ian tubaron por kapti akvon el la roĵo de la fonto, ekaperis monstra, granda serpento, kiu furioze atakis kaj mortigis kelkajn el ili.

Tiu serpento apartenis al la terura dio de la milito Areso (Άρης) kaj estas pro tio, ke la fonto havis la nomon de la dio. La monstra serpento estis gardisto de la fonto, kiu, pro ne konataj kialoj, permesis al neniu alproksimiĝi kaj ĉerpi akvon, kaj ekzakte pro tio la tuta vasta ĉirkaŭa regiono, ĝis la alveno de Kadmo, estis senhoma.

Kadmo, kiu en despero konstatis, ke ĉiuj liaj revoj kaj planoj fiaskas, ke tiu monstro vanigas la tutan penplenan ĝistiaman esperigan laboradon de tiom multaj homoj, por la unua fojo ekkoreregis. Li tuj prenis siajn armilojn kaj iris al la fonto. Kiam la serpento minace prezentiĝis antaŭ li, Kadmo lertece evitis ties atakojn, li ne detiriĝis, li kontraŭstaris kuraĝe, eĉ li sukcesis fortege bati la monstron kaj per grandega ŝtono krevigi ĝian kapon.

Provizore la malfacilaĵo estis venkita, do, ĉio sekvis sian iradon, ĉiuj laboradis senripoze por la efektivigo de la ambicia revo, fondi unu el la plej grandaj kaj brilaj ŝtatoj de Helenujo.

Malgraŭ la fervoro kaj la arda penado de siaj malmultaj kunuloj, Kadmo konsciadis, ke la afero ne iras tiom glate kaj rapide, kiom li esperis, li do, komencis havi dubojn pri sia sukceso. Tiaj pensoj turmentis lin, ĝis kiam Atena prezentiĝis en lia sonĝo. La diino patrinece mildigis lian ĉagrenon kaj ŝi konsilis lin eltiri la dentojn de la mortigita monstro kaj semi ilin en proksima agro. Kadmo vekigis kaj tuj faris tion, kion la diino sugestis al li. Li eltiris la dentojn de la serpento, li dissemis ilin kaj senpacience li atendis la rezulton. Post nelonge, li iĝis atestanto de nekredbla miraklo, de mirindaĵo neperceptebla; el la grundo subite ĝermis kaj tuj ekkreskis multaj altaj, grand-korpaj armitaj viroj, en milita uniformo. Kadmo konsterniĝis, surpriziĝis, sentis fortan ektimon, li regresis, tamen li devis defendi sian civiton, li haltis kaj ĉar li estis sola kaj ĉar li estis senarmita, li prenis ŝtonojn kaj komencis ĵeti ilin al tiuj nekonataj soldatoj. Tiuj lastaj, verŝajne opiniante, ke la ŝtonoj estis ĵetitaj de la apudestantaj viroj, eltiris la armilojn kaj komencis kruele batali inter si. Kadmo povis nenion pensi, nenion kompreni, nenion fari, li nur staris embarasite, nereaginte, li rigardadis la mirigan okazaĵon kaj li atendis. Post nelonge la batalo ĉesiĝis, nur kvin viroj restis starantaj kaj ĉiuj ceteraj estis mortigitaj. Tiuj viroj aliris al la surprizita Kadmo, ili kliniĝis antaŭ li kaj subuldece ili lasis ĉe liaj piedoj siajn armilojn. Nur tiam Kadmo komprenis, ke tiuj kvin fortaj viroj estas donaco de Atena, la solvo al la problemo kiu turmentis lin.

Tiuj viroj ricevis la alnomon "Spartoj" (Σπαρτοί),



vorto signifanta "semitaj". La kvin viroj kiuj restis vivantaj havis la nomojn Udeo (Ουδαίος), Ĥtonio (Χθόνιος), Peloro (Πέλωρ), Hiperenoro (Υπερήνωρ) kaj Eĥiono (Εχίων) kaj iĝis gentopatroj de la plej grandaj idaroj de Tebo.

Iom pli supre mi diris, ke post la mortigo de la serpento, provizore la malfacilaĵo de Kadmo estis venkita. Mi diris "provizore", ĉar Areso, la mastro de tiu monstro, koleregis kontraŭ Kadmo kaj la kolero de tiu dio estis ja neimageble terura. Li estis preta konsumi, ekstermi la murdinton de sia serpento, sed intervenis Atena, intervenis Pozidono, la avo de Kadmo, eĉ la reĝo de la dioj, Zeŭso mem enmiksiĝis en la afero por mildigi la senbridan koleron de la aroganta, kruela dio.

Fine, estis kompromiso, laŭ kiu Kadmo devis iĝi servisto de Areso dum sufiĉe longa tempo egalanta ok nuntempajn jarojn. Kadmo obeis, li suferis la sklavecon kaj kiam la fiksita tempo de lia devo pasis, li revenis al sia amata, preta jam civito, kaj en gloro iĝis la unua reĝo de Tebo.

Tiele estis fondita unu el la plej grandaj kaj en la daŭro de la jarcentoj unu el la plej fortaj kaj gloraj helenaj landoj. Kaj la tuta teritorio de tiu lando kies centro estas la granda urbo, memore al la bovino, kiu montris la lokon, ricevis kaj ĉiam havas la nomon Beotujo (Βοιωτία), el la vorto "βους" (bus), signifanta "bovo".

Kadmo estis reĝo je ĉio perfekta, bonfarema, progresema, pacama, amata de la tuta popolo. Li edziĝis kun Harmonia (Αρμονία), la belega filino de Areso kaj Afrodita (Αφροδίτη) kaj la homoj rakontadis, ke la brilan nupton, okazintan en la grandioza palaco de Kadmo, partoprenis ĉiuj grandaj, olimpaj dioj, ke la nuptajn himnojn kantis, ĉiuj kune, la Muzoj (Μούσσαι) mem. La homoj diradis ankoraŭ, ke Kadmo donacis al sia amata edzino mirindan kolieron faritan de la dio Hefesto (Ηφαιστος) kaj vualon teksitan de la Karisoj (Χάριτες).

La feliĉa reĝa paro akiris kvar filinojn, kiuj ricevis la nomojn Semela (Σεμέλη), Inoa (Ινώ), Agava (Αγαθή), Aŭtonoa (Αυτονόη) kaj unu filon, Polidoron (Πολύδωρος).

Kadmo reĝis sufiĉe longe super Tebo, tamen kiam



liaj infanoj grandiĝis, li decidis foriri de sia amata lando. Li faris tion, ĉar li kredis, ke li devas lasi sian valoran kreitaĵon vivi kaj pluprospere per si mem, sen lia patriarka alesto. Li realigis sian decidon kaj unu tagon, kune kun sia edzino, li foriris kaj iris tre malproksime, al la lando, pli poste nomita Ilirio (Ιλλυρία). Mi diras pli poste, ĉar en tiu lando Harmonia naskis unu ankoraŭ filon, Ilirionon (Ιλλυριός), de kiu la lando ricevis sian nomon.

Ili unue atingis Eĝhelon (Εγγέλη), la landon de la Eĝhelanoj (Εγγέλειοι), kie Kadmo estis akceptita kun entuziasmo de la popolo. Tio okazis, ĉar antaŭ kelka tempo la Eĝhelanoj, kiuj longe militante kontraŭ najbaraj atakantoj suferis multe, estis ricevintaj sanktan orakolon, laŭ kiu, se iu eminenta fremdulo, iu Heleno iĝus ilia estro, ili nepre venkus siajn malamikojn kaj ĉesigus la mortigan militon. Tial, la kapoj de la suferanta lando, petegis Kadmon akcepti la sceptron kaj preni sur sin la devon estri la konsumitan lian armeon. Kadmo, rigardante tion kiel signon de unu

ankoraŭ dia deziro, akceptis la devon kaj kondukis la armeon al decida venko kaj definitiva fino de la milito. Tuj poste, ankoraŭfoje li montris sian saĝecon kaj prudentecon, li unue firmigis stabilan pacon kaj poste li transdonis al siaj novaj kuncivitanoj kiel eble plej multon el siaj scioj kaj spertoj. Post nelonge en la nova patrujo de Kadmo regis akordo, harmonio kaj prospero.

En tia bela etoso Kadmo kaj Harmonia pasigis sian restan vivon, ĝis kiam ili multe maljuniĝis. Kadmo, malgraŭ tio, ke en sia tuta vivo marŝis sur la ĝusta vojo, montrata de la dioj, havis en si, havis en sia konsienco la pezon de tiu malnova murdo. Li ĉiam memoris kun malĝojo, ke li estis mortiginta tiun serpenton, kiu faris nur tion, kion lia mastro, la dio Areso ordonis kaj postulis de ĝi. Turmentate de tiaj pensoj, la bonkora Kadmo, kelkajn tagojn antaŭ sia morto preĝis kaj varme petegis la diojn aliformi lin en serpenton. La dioj, montrante ankoraŭfoje sian amon al sia favorato, plenumis lian deziron. Tiel, Kadmo kaj Harmonia mortis kune kaj aliformiĝis en senvenenajn, malsovaĝajn serpentojn de la arbaro. Tamen, tio ne daŭris longe, ĉar la reĝo de la mondo, Zeŭso, ne povis akcepti la tian finon de la bonkora, saĝa homo, do, li sendis lin kaj lian edzinon al Elizeo (Ηλύσια Πεδία), kie ili vivas eterne, feliĉaj, inter la dioj kaj la senmortaj perfektuloj!


## GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio  
(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

## Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo

-- el retejo OLE

### La fratoj Rossetti: Sperto saĝon akriĝas



Reto Rossetti - Cezaro Rossetti

**S**e oni demandus min, kiun libron, originale verkitan en Esperanto, samtempe vivplene distran kaj lingve vervan, mi elektus kiel ripete ĝuindan, mi emus mencii libron, la solan de ties aŭtoro, libron, aperintan antaŭ pli ol duona jarcento kaj dufoje reeldonitan, la romanecan membiografion *Kredu min*, sinjorino de Cezaro Rossetti.

La aŭtoro, kolportisto, en milda printempa tago, iras de pordo al pordo kun sia varo, la "senakva kuirilo", sed estas ĉie rifuzita. Li ekhavas la ideon kaŝi la valizon, por ke ĝi ne estu videbla, kaj frapas novan pordon. La pordo malfermiĝas, kaj tie staras koketa servistino:

"Bonan tagon mia karega," mi mielis, strabante al ŝi. "Vi estas rave bela. Ĉu vi emus eliri kun mi ĉi-vespere?"

Ŝia ŝoke timigita rigardo amuzegis min, kaj mi laŭte ridis. Terurite ŝi enkuris, fermante la pordon. Mi



certas, ke ŝi pensis, ke mi estas altgrada maniulo. Fakte, la frenezulejo ne estis malproksime de tie. Tiu epizodo ĝojigis min kaj hazarde atentigis min, ke la kaŝo de la valizo estos avantaĝo, ĉar ne tuj vidiĝos, ke mi estas kolportisto.

La ĉapitro, el kiu estas citita la supra ekzemplo, havas la titolon Konstante frapante..., kiu estas aludo al la konata poemo de Zamenhof La Vojo, aludo kiu havas proverban karakteron. Ĉiu el la 43 ĉapitroj de la libro havas Zamenhofan proverbon kiel titolon, kio samtempe ligas la verkon al la kultura tradicio de Esperanto kaj kerne rivelas la temon de la koncerna ĉapitro.

Cezaro Rossetti (1901-1950) sin okupis pri diversaj aferoj dum sia nelonga vivo. Dum kvar jaroj li estis en Hindio, kie li akiris restoraciajn spertojn. Revene li laboris kiel kuiristo en hotelo kaj kiel kolportisto kaj eksponisto, reklamante kaj vendante varojn en foiroj. Pri tiuj spertoj rakontas lia sola libro, la jam menciita KREDU MIN, sinjorino. Ĝi konsistas ĉefe el longa vico de vendaj epizodoj, gaje kaj verve prezentitaj, kaj estas tiu flua, vigla kaj natura stilo, kiu donas al la verko ĝian plej grandan valoron.

Tamen pli konata estas lia frato, Reto Rossetti (1909-1994). La fratoj estis svis-devenaj, sed vivis kaj laboris en Britio. Profesie Reto estis estro de fakultato pri arto-pedagogio kaj influo de lia fako estas ofte konstatebla en liaj verkoj. Li debutis publike kiel Esperanto-poeto per la poemaro Oazo en la fama poemlibro Kvaropo (1952) en akompano kun William Auld, John S. Dinwoodie kaj John Francis. Tamen estas klare, ke li komencis verki multe pli frue, iuj el tiuj poemoj devenas el la kvara jardeko. Lia dua poemlibro, Pinta kraĵono, aperis sep jarojn poste. La poemoj de Rossetti estas variaj laŭ temo kaj etoso, multaj atestas akran observon, aliaj sentajn sintenojn, foje grimacajn, ekzemple en la jena infan-rimaĵo:

*Per petardo Sam petolis,  
poste li raketon volis;  
poste per bengala fajro  
ludis li en dom' el pajlo.  
Tutan domon kaptis flam',  
tra l' tegmento saltis Sam.  
Fluge, fluge li sin pafis,  
fine sur la lunon trafis.*

La plej longa poemo, Jubilea Eposo, estas 30-paĝa poezia skizo pri la historio de la internacia lingvo kaj aparte de Esperanto, verkita okaze de la 50-jara datreveno de la unua mondkongreso en 1905. Lerta uzado de la lingvo karakterizas la poezion de Reto Rossetti, kio plej klare montriĝas en la varieco de

poemformoj.

Kiel verkinto de prozo Reto Rossetti ementas kiel novelisto kaj eseisto. Lia novelaro El la maniko estas interesa legaĵo pro ĉiu progresanta esperantisto. La titolo pensigas pri ĵonglisto, kaj precize kiel tia, la aŭtoro impresas la leganton per sia verva kaj sprita eltrovemo, teme kaj lingve. La lingva ĵonglema de la aŭtoro plej evidentas en la rakonto pri profesoro Klapelklap, kiu per literkartoj trovis metodon esplori la devenon de nov-vortoj en Esperanto, sekve la bazon de nova scienco, kiun li nomas "neologismologio". La noveloj atestas la interes-kaptan rakontan kapablon de la aŭtoro, kiun ĉiam akompanas ludema humoro, psikologia kompreno kaj, je okazo, sprita ironio.


Reto Rossetti estas unu el tiuj homoj, kiuj dediĉis sian vivon al Esperanto kaj, dum jardekoj, kontribuis al la literaturo kaj kulturo de la internacia lingvo. Tion li faris ne nur per siaj poemoj kaj noveloj, sed ankaŭ kaj ne malpli per siaj multnombraj eseoj kaj artikoloj en diversaj revuoj. Kelkaj el liaj eseoj aperis en libroformo, Arto kaj naturo, lia lasta libro, en 1989. Reto Rossetti okupis sin ankaŭ pri instruo de la lingvo kaj verkis lernilojn. Kaj, kiel atendeble, li multe tradukis, tie elstaras tradukoj el la verkoj de Shakespeare kaj aparte lia traduko de Otelo (1960).

La fratoj Rossetti jam apartenas al niaj klasikuloj. KREDU MIN, sinjorino kaj El la maniko estas libroj, kies ripetaj legoj ĉiam aldonas ion novan, profundan aŭ praktikan al nia lingva maturiĝo.

de **Baldur Ragnarsson**

(Juna amiko, n-ro 112, 2005)

Fonto: <http://literaturo.esperanto.net/tekstoj/ragnarsson/rossetti.html>



### Rezultoj de la esploro

Ĉiuj sidlokoj en la seminaria ĉambro de la instituto estis okupitaj. La tuta esploranta personaro kunvenis. Profesoro Brundt staris antaŭe apud d-ro Mojo kaj salutis la ĉeestantojn. La sola temo de la tagordo estis la raporto pri la plej novaj esploraj rezultoj el la sekcio por primatoj. D-ro Mojo komencis:

„Finfine mi komprenis la kernajn diferencojn inter la DNA de homoj kaj ĉimpanzoj. La ĉeloj en mia korpo estas ja parte homdevenaj. Daŭre okazas multaj interŝanĝaj efikoj inter la du ĉelaj tipoj. Tion oni ankaŭ rekonas je la aktivecoj de la genoj. Mi estas certa, ke ni nun kapablas precize ŝanĝi la ovojn de ĉimpanzo per inserto de homaj genoj.

Kompreneble mia esplorado ĉefe fokusiĝas al la celo, doni al niaj samspecianoj la parolkapablon. Tio neeviteble ne nur kondukas al ŝanĝoj en la cerbo, kiuj influas la formadon de la konscio. Necesas ankaŭ gravaj ŝanĝoj en la anatomio. Tio ja okazis en mia korpo. Tial mi nun ankaŭ disponas pri homsimilaj organoj, kiuj ebligas la paroladon. Vi ja scias, ke la fontaj ĉeloj, kiujn oni insertis en mian embrion, kaŭzis ĝuste tiujn efikojn. Sed mi mem, kiel kimero, ne

kapablas transdoni la novajn kapablojn al miaj estontaj infanoj. La sola vojo estus uzi modifitan ĉimpanzan ovon por reproduktado. Kun ino portanta tian ovon, ne nur mi, sed ankaŭ ĉiu alia virĉimpanzo povus generi idaron kun la novaj trajtoj, kompreneble nur per artefarita fekundigo. Estas klare, ke la venonta generacio ne plu bezonus tiun metodon. La reproduktado tiam kompreneble estos denove kiel kutime inter mamuloj.“

Ĉi tiu parolado kaŭzis grandan kirlon. Sekvis ekscitita diskuto. La plej oftaj objetoj traktis la intervenon en la ĝermlinio [\*]. Tia manipulado de homaj gametoj estis strikte malakceptita de la plej multaj esploristoj.

Sed d-ro Mojo atentigis la kunvenon, ke la ĝisnuna malpermesita enmiksiĝo en la ĝermlinio rilatis nur al homoj. Li mem sentis sin ĉiam ankoraŭ kiel ĉimpanzo, malgraŭ sia kimera ekzistado, pri tiu li ja klare konsciis. Do, li pensis, ke por ĉimpanzoj tiaj intervenoj ne povas esti malpermesitaj.

Denove sekvis akra interŝanĝo de argumentoj. La timo al la reago de la publiko simple estis tro granda. Tial ne plu penseblis financaj subtenoj por la esplorado de d-ro Mojo.

[\*] *Post la unuiĝo de la gametoj ekestas la zigoto. Ĝi evoluiĝas al individuo kun gonadoj, kiuj produktas novajn gametojn. Tiun sinsekvon de la ĉeloj oni nomas 'ĝermlinio', angle 'germline', germane: 'Keimbahn', france: 'lignée germinale'*

(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio  
(plumnomo Erik Tantal)

fonto: <http://esperanto-klaus.de/>

27>>

laŭ mia kuracisto mi havis stomakulceron. Kelkajn semajnojn poste mi trovis alian familian kuraciston, kiu inter alie asertis ke mi ne havis ulceron, nur trofunkcion de stomaknervoj ne kuraceblan. Kelkajn monatojn komenciĝis la Dua Mondmilito en Nederlando, sed mi ne bezonis batali ne estante en la armeo. Tiu milito en Nederlando daŭris nur kvin tagojn, ĉar la germanaj flugmaŝinoj jam detruis la tutan centron de Roterdamo, kaj avertis ke tuj ili pretos por detruo la historian urbon Amsterdamo kaj poste aliajn urbojn. Nederlando do ĉesis militi. Post tio la Germanoj eniris Danlandon, sed

la dana registaro tuj rezignis kaj perdis nur unu soldaton, kiu hazarde devis defendi la reĝan palacon. Dum en Nederlando multaj homoj mortis pro la bombardado ate de la germanoj. Tamen mi forte supozas, ke la brita kaj la usona registaroj postulis ke Nederlando deklaru militon al Germanujo, kaj ke la dana registaro ne obeis tian postulon de Britujo kaj Usono.

de **Marcel Leereveld** el Aŭstralio  
Fonto: **Aŭstraliaj Esperantistoj AE501**

## Boto Ŝtraŭso 1: Pri amo

### Historioj kaj maloj

### Paroj, korpamikoj

### (daŭrigata)

#### Plezuro

La vivo de la estiĝanta patrino en la rondo de estiĝantaj patrinoj, ĉiuj solidaraj, informitaj pri la plej gravaj aferoj, la konsilantaro de gravedulinoj renkontiĝas marde ĉe Helen, nur la domzorgisto restas olda mishumora solulo. Informita, pala, ĵus rezigninta la fumadon, iom grasa hararo, ĵinso kaj t-ĉemizo kaj super tio folkloreca trikaĵo, soifa pri ĉiam pli da informo ('literaturon' ili nomas tion mallonge kaj amplekse), prefere la permanentan diskuton, por protekti sin kontraŭ feliĉo, malfeliĉo kaj aliaj nekomprenblaĵoj. La edzo de Helen, juristo, blonda, kun forte maldensiĝinta kaphararo, mentona barbo, en la kvara monato de ŝia gravedo aliĝis al la socialdemokrata partio. Lia emo al skandinavaj munteblaj mebloj trudiĝis dum la meblado de ilia tri-kaj-duon-ĉambra loĝejo. Bona moderna du-gerilato. Ili traktas unu la alian senstreĉe kaj afable, sen troigoj, sen flamo. La 'tielnomatan nerealon' oni traktas kaj tenas sub kontrolo ĝuste per tiu ĉi formulo. Ilia sinteno al profesio kaj devoj estas, kiom eble plej, orientita al plezuro. Multo plezurigas. Dum amorado ili faris infanon.

#### Malfrua timemo

Ili renkontiĝas por vespermanĝo en ĉina restoracio. Ŝi estis tutan semajnon en Tesino, sole. Estus multo por rakonti. Sed tio ne facilas al ŝi. Angoro en multaj fakoj. Angoro enuigi aŭ seniluziigi. Angoro antaŭ lia malintereso, angoro malbone esprimi sin. Angoro malaperi sub terglito de lia simpatio.

Ŝi kunportis donaceton kaj ŝovas ĝin sub lian buŝtukon.

Ŝi estas dungito en aŭd-vid-ila vendejo, li loka raportisto ĉe radistacio. La historio ludas - ne, ĝi haltas, staras - post la feliĉo, nelonge post ĝi. Tiu feliĉo, per kiu li surprize prenis ŝin, kiu altigis ŝin por mallonga tempo en nekonatajn altojn de la memkonscio (aŭ de memtrompiĝo), por poste, kiam ĝi estis forŝvebinta de ŝi, restigi ŝin senkonsila, duoble malcerta, timema kaj sole nur sindoneme fidela.

'Kial mi?' - tion ŝi komence ja demandis al si. Sed kiom rapide forflugis tiu nova skeptiko, kiom malforta

kaj dolĉe kaduka fariĝis tiu demando baldaŭ kaj kiom efemera ĝi estis, kompare kun tiu alia nun: 'Kial mi ne plu?' Demando, kiu restis obstine senresponda kaj sen espero, ke ĝi iam estu ree disblovita de nova kreitaĵa senpripensemo.



Ŝi faras provon rakonti pri la vojaĝo. Sed el tio eliĝas nur hundeto, la hundeto kun la skarlatruĝa pelerino ĉirkaŭventre, kiu sur arkada korto returnis sin al ŝi.

La viro klinas la kapon, kun la brakoj krucitaj surbruste, la mentono kaj vango inter dikfingro kaj rektigita montrofingro.

Ŝi ne povas rakonti. Ŝi simple ne povas ion vive prezenti. La virino sidas kun apogitaj kubutoj ĉe la tablo. Ambaŭ manoj estas plate interŝovitaj. Jen ŝi fleksas la dekstran, jen la maldekstran manartikon. Kaj de tempo al tempo ŝi kuŝigas la antaŭŝovitan mentonon sur la interplektitan fingromaton. Ŝi vidas lian kontraŭsidadon, kaj lian minacan aŭskultadon. Ŝi vidas, kiel li prenas la manon el la vizaĝo kaj firme interplektas ambaŭ manojn ĉirkaŭ la brusto. Tio aspektas komforte sinrega. Sed ankaŭ defendkapabla kaj ŝirmita. Oni ĉirkaŭbrakas sin mem kiel armaĵo. Kaj pluketatas per kaŝitaj fingroj sub la akseloj ĉe la pulovero. Oni tronas, sed nur kiel memreganto.

Ŝi kun sia kapo plena de muziko - la sennombrajn ludversiojn de ĉiuj Betovenaj, Listaj, Skrjabinaj sonatoj ŝi kompetente distingas - tiun muzikon kun ĝiaj vagantaj promesoj, subitaj ekscitiĝoj, profundaj konsoloj; tiun arton, kiu tiom emigas al la alia - li ne aŭdas muzikon. Li indiferentas pri ĝi. Li povas vivi sen muziko. Li kunaŭdas ĝin, jes, sed li ne aŭskultas. De kie li nur prenas la materialon por sia pasio, kiun li ja posedas, tio estas pruvite, se muziko lin tamen ne vere tuŝas? Li ne legas multe. Li ŝatas promeni. Ĉu okulhomo? Ne nepre. Pli ĝuste introvertita. Li estas ankaŭ delikatsenta, sed simple ne muzikema.

En tiu damnita proksimeco niaj okuloj ĵetas vualon sur la alian! Ĉiufoje, kiam ŝi ne ĉeestas kaj ŝia foresto ĉirkaŭas lin kiel ideala proksimeco, tiam li bedaŭras siajn severajn notojn, kiujn li donis al ŝia ĉeesto. Tiam li sentas, ke nur bono venas de ŝi kaj ke ŝi estas profunde bona. Mankosenton kaŭzas nur ŝia korpa vidalvido.

Oni mem, senescepte oni mem etendas la vualon de plaĉo, de sekreto, de afabla fremdeco super la amatan aŭ eĉ nur urĝe bezonatan homon. Nenia mio eltenus la nudan proksimecon de iu alia. Kaj ĉiu konas

la subitan ŝiron en la vualo; sufiĉas obstina opiniado, ia okulfrapa neglektaĵo, kaj la pinto de ĉirkaŭnubata masivo da neakordigeblo estas abrupte heligata - kion mi tie amas?

Ŝi ne havas plu memfidon por io ajn. Mute ŝi rigardas lin, la vangon oblikve kuŝita sur la mandorsojn, kun senkuraĝa rideto. 'Mi ne povas foriri', diras ŝia rigardo, 'tion devas fari vi.'

Li evitas ĉian decidon. Ĉu vere? Envere li jam delonge decidiĝis: li ŝatus lasi ĉion kia ĝi estas. Kvankam tio apenaŭ eblos. La sentoj, la atendoj ĉie kunfrapiĝas kun tiu oblikva abatiso.

Li ne plu parolas al ŝi. Pezeco de vi kaj spaco. Sidi, gapi flanken, fariĝi konstante pli timema. De la mutado enŝlosita en ŝvitkeston. Implikita, fikslaĉita. Nenia buŝo, nenia vorto, nenia mano. 'Mi perdis vin. Vi ne plu respondas.'

Kaj ĉia frustrado, dirado, vokado, kiu iam estis inter ili, formuĝas al marondo super la virino, kiu peze, plenigita de nedireblaj ŝtonoj, sinkas sur la grundon. Supre, en fora supro, kie balanciĝas la lummakuloj, estas lingvo, dorlotata de aero kaj suno; kiel alta velo ĝi kuŝas ĉe la spiro de komprenataj homoj.

Ne ekzistas deviga kialo lasi tion. Por tio necesas kunpuŝiĝoj, etoso de ekvojaĝo. La nuna kelkfoja laco estas - kiom ajn paradokse tio sonu - ankaŭ metodo de respekto. Kial ne licu, ke post la festo oni renkontiĝu iomete ĝenate. Ke oni iomete distanciĝu post tiu okazo plej violenta, de blinda fortego. Laŭ li, tio povus trankvile daŭri tiel. Jam nur la penso pri adiaŭo produktas en li pluson da varmo kaj atento, kiu momente en ilia rilato ne estas aplikebla.

Li diras sen plej eta dubeto: 'Mi feliĉas ke vi ekzistas.' Aŭ: 'Mi dankas vin ke vi estas ĉe mi.'

Kiam ŝi estas alparolata kun atento, tiam ŝi por momento komencas paroli kvazaŭ vekite. Sed tuj poste ŝia voĉo sinkas, ŝi haltas; ŝi laŭspuras ian tuŝitecon, same kiel antaŭe juna knabino mallevis la okulojn. Sed estas ankaŭ, kvazaŭ ŝin kaptus leĝera funebro, une mlancolie dvote, kiam ŝi estas alparolata.

En Askono dum la varietaja vespero, la konferenciisto, kiu venigis ŝin sur la scenejon, kvankam ŝi ne estis sin anoncinta, kaj kiu diris al ŝi: 'Bonvolu malvesti viajn laĉojn.' -

Neimageblas nun, kiel el tiu ĉi demoraliza vidalvidulo, el tiu demoraliza fizika rimarkado iam elkondukas vojo en la liberan mallumon de brakumo, per kiu nepre finos ankaŭ tiu ĉi vespero. Neimageblas nun por li: ŝi kun larĝa pupilo, paŭta lipo, ŝi kun la krudaj, bruskaĵaj leviĝoj, kiuj similas al la korpobatoj de kaptita fiŝo. Ŝi - la solulino tie antaŭ li, lia solulino, kiun li nun neniam povus brakumi. Ŝi, fleksita super la telero dummanĝe, la longan, ĵus lavitan hararon, kiu minacas

fali sur la manĝaĵon, kuntenanta per la dekstra mano, ĵetante ĝin malantaŭen kaj supren, kun la iom vulgare disformitaj buŝanguloj, kiam ŝi diskarakas la fritiĝon per la dentoj, ŝiaj maldikaj, por ne diri araneaj fingroj, ĉe kiuj la plej antaŭa membro okulfrape forte defleksiĝas, kiam ŝi premas la bastonetojn en la rizon...

Ni reduktis nin ĝis la nodo de la feliĉo. Tiun li unue malnodu al mi! Poste en la noktoj tamen estas miraklo, spite al ĉia reteno kaj stagnado antaŭe. Mi sentas vin, mi flaras vin, mi gustumas vin...

Okulfrapas cetere ŝiaj inhibicioj antaŭ kelneroj kaj taksistoj. Ĝenerale malfacilas al ŝi diri dankon. Sed precipe ĉe servoj, por kiuj necesas pagi. Estus pli facile al li alparoli ŝin, se fine la oblikve-scia rideto malaperus de ŝia vizaĝo, per kiu ŝi tiel mizere maskas sian malcertecon. Ĉu tie en la angora okulo ne konstante glimas ia flanklumo de moko? Tiu malbone sidus al ŝi! Kaj ĉu ŝi ne volas montri la dentojn, kiam ŝi metas la panerojn inter la tranĉodentojn?

Ekzistos ĉiam io, kion oni nur malfacile superos. Same kiel al ŝi finfine restos nekomprenebla, ke al homo, kiun ŝi proksimas, certa melodio, kiun ŝi amas pli ol ĉion, ne diras la samon kiel al ŝi. Ŝi devos akcepti, ke li muzikon, kiu ŝin altigas kaj malstreĉas, kiun ŝi bezonas por entute kapabli senti, tuŝi alian homon, ke li muzikon envere ne rimarkas, ke ĝi lasas lin indiferenta.

Pli forte ol ĉiuj senhezite prenantaj manoj, kiuj iam ajn atingis lian haŭton, restos en lia memoro ŝiaj inhibicia, suferanta mano. Kiu ne povis preni, ne kapti, eĉ ne karesi, sed ĉiam kuraĝis nur tiun periferian, viŝantan frotadon. Karesadon, kiu povis provoki anserhaŭton. Se oni malsanas je tia handikapo, ĉu oni entute rajtas peti alian homon al si? Kiom li frostis sub tio kaj tamen toleris, rezigne akceptis tion fine, ĉar alie nur bono venis de ŝi, precipe ŝia serioza, mallerta korpoforto, kiu ankoraŭ daŭre fascinas lin!... Nur tiu seka viŝado, kiu por momentoj rigidigas lian haŭton al pergamento, al morta teksaĵo, al kapkusentegaĵo -

Verŝajne li ne plu vidas min. Tiu homo, kiu komencas apud mia mano, perdas min el la okuloj. Duonnokte, krepuske, dum nia longa vojo.

Kio restas, kiam ni deprenas ĉian mutadon kaj ĉian seniluziigon? Daŭre miraklo. Daŭre io mire bela.

### **Amo de Unua Nokto**

Kiom ajn fremda estu la alia ĉe klara lumo - tiom senbara estas tamen la nokta fido, tuj kiam li nur havas sian lokon en la mallumo apud vi.

En la mallarĝa ĉambreto sur la larĝa lito ni kuŝis post multaj brakumadoj en maltrankvila dormo - la hazardulino kaj mi, ambaŭ kondamnitaj sole kaj ekskluzive nur povi ĝui la 'Amon de la Unua Nokto',

najlitaj al tiu kruco kaj ne plu kapablaj je alia deziro. Sternite sur la ventro, kun la vizaĝoj spirantaj kaj deturnitaj unu de la alia, ni tenis la brakojn volvitaj ĉirkaŭ niaj nudaj dorsoj. Ĉiam denove eliĝante el surfaca, grimaca dormo, mi perceptis la ripozantan forton de la granda, svelta korpo apud mi, korpo, kiu post niaj profundaj kaj bruskaĵoj 10 tuŝoj nun ree apartenis tute al si mem. La vivo de tiu nekonata homo ŝajnis kuŝi antaŭ mi rondiĝite en sia perfekta formo. La beleco de tiu mola kaj streĉita, de tiu ampleksa, sed nenie abunda korposurfaco estis por mi sufiĉe da animo kaj kroniko; ankaŭ la tempo, la vana daŭro de komunaj jaroj ne povintus malkaŝi al mi pli da personeco ol ĉi tie videblis. La fortika nuklinio, kiun renkontis la galboj de la larĝaj ŝultroj, kiu pluis en la longa spinsulketo, altiĝis al la postaĵo, dividiĝis kaj defalis sur du longajn X-gambojn ĝis la internen turnitaj piedoj kun malpuraj, kornitaj kalkanoj - ĉion ĉi mi vidis, dum ĝi travideble ĉirkaŭis min, kaj tenis ĝin en mia brako kiel la faktan parton de ideala aperaĵo. Tiu

persono ekzistis eble dumaniere. Unue tiu juna, fidema virino, okulfrape bela kaj altkreska, kiu ne ĝenis sin endormiĝi kie ajn plaĉis al ŝi, kiu maldorme elbuŝigis la saman strangan, sobriĝan lingvon kiel mi. Sed aliflanke ekzistis tiu nekredbla dorso, sur kiu kuŝis nun mia brako, kaj mi estis konvinkita, ke nenia viro iam povos posedi tiun formon, ĉar kreitaĵa respekto de la sensoj certe malhelpos lin. Mia opinio eĉ ŝia propra virina memkonscio delonge ne sufiĉis por kompreni kaj posedi eĉ nur iomete la potencon kaj spiriton de tiu ĉi korpo; ne, ankaŭ ŝi ne estis estrino de tiu formo.

<sup>1</sup> *Botho STRAUSS (naskiĝis la 2-an de decembro, 1944 en Naumburg) estas germana aŭtoro de rakontoj, romanoj, dramoj, eseoj kaj filmscenaroj.*

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

\*\*\* publikigita kun permeso de la tradukanto \*\*\*  
 Fonto: <http://vlutermano.free.fr/Strauss1.html>

## BOHDANA JEHOVA Poezio

tradukis kaj sendis Petro Palivoda el Ukrainio



### ESTIS VI ĈI TIE

La animon postrestas nek larmoj  
 nek ĝemoj -  
 anstataŭe nur estas angoraj  
 poemoj,  
 kaj anstataŭ malĝojo - lacec'  
 iometa...  
 Ĉar animo graviton neniam suferas,  
 ĝi ja estas senpeza, kaj ĝi  
 superteras.  
 Jen ĝi estas pasia, jen estas kvietaj,  
 ne influas ĝin teraj reguloj kaj celoj,  
 siaj propraj inspiras ĝin revoj kaj  
 veloj...  
 Kaj se volos ŝi morti pro sia soleco  
 kompleta,  
 kraŝi pluvosimile surteren senkrie -  
 rememoros ŝi: estis vi iam ĉi tie...

### KONTRAŬTEMPO

Estu vi mia rev', mia akvo viviga...  
 Se ekzistas aferoj en viv'  
 klare antaŭvideblaj -  
 ili certe al vi ne rilatas.  
 Kaj se menso ekzistas,  
 nun ĝi dormas kviete,  
 la okulojn ferminte plej firme,  
 dezirante nenion kompreni.  
 Se la koro ekzistas  
 (kiel kuploorgano de sentoj),  
 petas ĝi lasi ĉion senŝanĝe;  
 kaj por ĝi estas bone, kaj mi revas  
 pri amo.  
 Sed la tempo ekzistas -  
 super ni ĝi potencon posedas,  
 aŭ superas ni l' tempon kontraŭe;  
 ni per forto de flurapideco ĝin dotas.  
 Memorigas ĝi: revo ne estas eterna,  
 kaj nek homoj nek vortoj iliaj,  
 kaj mi scias, ke pravas ĝi certe,  
 sed ne mi bedaŭrinde...  
 Estu vi kontraŭtempo por ĉiam.  
 Dum la vorto poeme eksplodas -  
 jam nenio ekzistas,  
 krom la revo pri amo.

### FLORO

Kiam la floroj forvelkos -  
 vi ne hastu forĵeti ilin,  
 aldonu la petalojn al via  
 teo,  
 Gustumu la aromon inter aliaj gustoj  
 de kampaj petaloj el la paseo.  
 Aŭskultu, kiel muteco bruas,  
 simpleco flirtas per la plej profundaj  
 koloroj.  
 Ĉu vi rimarkas?  
 Tiu floro estas la plej viva el ĉiuj  
 vivantoj...  
 Se jes -  
 ekzistas neniu tempa distanco inter  
 viaj koroj.



ilustraĵo de Asja Beĵerjanu



Ĝi estos malfelĉ', se bakos la botisto  
Kaj botojn faros la bakisto. Atendas ilin ambaŭ  
malsukces'.  
Mi diras rekte, laŭ konfes':  
En la meti' malklera amatoro  
Obstinas ofte sen rezon', —  
Rezulte por afer' okazas nur la ploro,  
Kaj pro obstino sen bezon'

Famiĝas malklerul' al moko plene,  
Ĉar spertajn homojn por ekkon'  
Li ne konsultas laŭkonvene.  
Jen venis la ideo al Ezok'  
Praktiki Kat-metion dum la nokt'.  
Ĉu logis lin diablo per envio  
Aŭ tedis jam fiŝmanĝa tradicio,  
Ekpetis li al Kat' kun tre insista lert'  
Lin preni kune al ĉasado  
Por kapti musojn al desert'.  
"Ĉu konas vi aferon, kamarado!"  
Demandis lin la Kato kun avert':  
"Al mus-kaptad' vi tute ne kutimas,  
Ne vane oni bel-esprimas,  
Ke la afero majstron timas."  
"Ne diru, amikul'! Ĉu estas ĝi afero?  
Kaptadis mi eĉ perĉojn en rivero!"  
"Do iru ni, kaj helpu nin la sorto!"  
Post plena plezuriĝ' satmanĝis Kat'  
Kaj iras li al sia kamarad'.  
Sed al Ezoko voston manĝis rat',  
Kun malfermita buŝ' li kuŝas preskaŭ morta.  
Vidante, ke Ezok' ne taŭgas al kaptad',  
La Kato-amikul' fortrenis lin al lag'.  
Kaj nun, Ezok', anstataŭ ĝuo  
Por vi instruo!  
Estonte vi prudentu  
Kaj musojn ne atentu.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio  
tradukis Sergej Grigorjeviĉ Rublov (1901-1979)  
Ukrainio

18>> spiradon, la spiradon ĝi devus kovri min!"

Kion li vidis trans la vitro? Li vidis la ledsaketon de la luno plena je luma cidro, sed ankaŭ ion diantan bukedon intere. Kion li cerbumadis? Li cerbumadis la erodon pro peza peko. Li estis trompinta longe kaj sisteme la aliulojn. Ne, estis ne la ĵusnaskito, estis la cico kiu aperis en siaj okuloj. Kiam li lanĉus la lastan spiron, pro ĉi tiu nepardonebla kulpo, eble eĉ la tero ne dissolvus la korpon. Sed restus espero, sola espero por iri al la Paradizo, kiel iras la infanoj, kiujn Dio ne starigas antaŭ la Juĝejo.

Nun, estante 98 jara, li forpelus per bastono la morton, ĝis li atingus jarcenton. Li esperis ke en tiu limo, same kiel dum la mamtrutra periodo, la nombrado de la aĝo startas vere el la komenco: Unu, du, tri...

Dum li mem rememoris pri tiu iama medicinista vizito, li alparolis la pranepojn:

- Kiel vi pensas, se iu havas du junecojn, ĉu li havas ankaŭ du infanecojn?

- Kial ne,- kaŝis sian subridon la junulo.- Ofte tiel oni diras. Oni diras ke, profunde dum maljuneco, la homo fariĝas denove infano.

Donat Shtjefni, ne volis montri signojn de debuleco kaj uzis la saman taktikon, li kaŝis la ravecon pro la venko. Unuafoje, sed subvoĉe, li murmuris: "Feliĉa estu tiu kanajlo, sinjoro kuracisto!"

**Zija Ĉela**

Tirana, novembre 2018

Enesperantigis kaj sendis **Bardhyl Selimi**  
el Albanio

12-an de junio 2020

## Giuseppe Belvedere, eble la paradigmo de la kontraŭfaŝismo?

## verkis kaj sendis Roland Platteau el Francio

**U**nu vidbendo pri tiu viro titolitas "Anĝeloj ne mortas" (eble anĝeloj sed kolombojn la komunumo de Parizo mortigas ilin - per gasumado ... - ĉar ĝi ne ŝatas ilin, hm ! se kategorion da homoj ankaŭ ili ne ŝatas ĉu ili mortigos ilin ankaŭ? Tia afero jam okazis!):

<https://ytube.tv/watch?v=4j8GJ3gWhnw&ok=1>



Kiam oni vidas la pezan laboron, kiun li plenumas ĉiutage por nutri la kolombojn, sub la malestimaj rigardoj kaj insultoj de la loĝantoj de l'kvartalo, ĉar li devontigis sin fari tion, li iel pensigas, sed pli morale kaj heroe, al la lumigisto de stratlampoj en "La Eta Princo" kiu ankaŭ baraktas lumigi kaj mallumigi sian stratlampon.

Alia filmeto:

[https://ytube.tv/watch?v=srcs\\_DCV9aY&ok=1](https://ytube.tv/watch?v=srcs_DCV9aY&ok=1)



Post la gasumado de la judoj, la gasumado de la kolomboj, tio estas "la spirito de moderneco", kiel diras Zygmunt Bauman ", ni forigas tion, kio ne plaĉas, (kaj poste estas la trisomio 21! vidu la libron de Jean-Marie Le Mené pri ĉi tiu temo) Radikale forigi tion, kion oni trovas embarasan, estas la principo de moderneco, kiu estis kaj estas plu abunde plenumata en nia teĥnika maltolerema mondo.

De la jaro 2011 Giuseppe Belvedere loĝas en sia aŭto (poste en kamioneto). Parkita en la kvartalo Beaubourg (4a Arondismento en mezo de la historia centro de Parizo, kaj apud la modernega kultura centro

"Pompidou"), la malnova Mercedes estas ĝia sola tegmento. Antaŭe ĉi tiu 67-jara eksa ĉefkontisto okupis loĝejon posedaĵon de la urbo. Sed en 2011, la urbestro de Parizo konsideris, ke li ne uzas lin kiel "bonan patron", kaj forpelis lin. Kialo plej mirinda ...



Sed la neoficialaj kialoj de ĉi tiu elpelo pli probable rilatus al lia amo al bestoj. Efektive Giuseppe dum jaroj nutris la plej malamatajn birdojn en la ĉefurbo: la kolombojn. Ŝatokupo apriorie tre malbone akceptita de la loĝantoj de lia kvartalo, kiuj ne hezitis montri sian malamikecon al la maljunulo kaj liaj praktikoj. Hodiaŭ, malgraŭ la malvarmo, malgraŭ la malforteco de lia situacio, Giuseppe daŭre helpas siajn etulojn. Ĉi-foje la polico minacas konfiski sian veturilon iam ajn. (ili finfine faris ĝin) Malfortika kaj malsana, li tamen rifuzas ĉian oficialan helpon, manĝon aŭ fajrujon. Unu asocio "Amikoj de Giuseppe" kreigis, mobiliziĝis per Facebook por helpi lin. Poste ili kotiziĝis por permesi al li aĉeti kamioneton. Ĉi tiu sinjoro fariĝis famulo en la kvartalo Beaubourg centre de Parizo apud la fama "Kultura Centro Pompidou".

Fotografiita de la turistoj, ĉar Parizo sen kolomboj ne plu estas Parizo! - sed neniu degnas alparoli al tiu penige paŝanta kaj ĉifonvestita malpura maljunulo. De dek jaroj Giuseppe Belvedere faras tri rondojn tage por ke ankaŭ la kolomboj havu ŝancon manĝi. De jaroj, ĉi tiu ĉifonulo flegas kaj nutras dekojn kaj dekojn da birdoj sur la antaŭkorto de la Centro Pompidou. Atento, kiu amuzas turistojn, sed incitas loĝantojn kaj urbajn instancon.

Lia sindediĉo multe kostis al li. Ne mirinde, ĉar nutri kolombojn estas agado malpermesita de la artikolo 120 de la departementaj sanaj regularoj kaj puninda per monpuno de 450 €. "Kun ĉi tiu leĝo," koleras la fondinto de la retejo Ambassadejo de la Kolomboj, la publikaj aŭtoritatoj kreis veran civilan militon inter la urbanoj. En Parizo kiel aliloke, multaj kontraŭuloj ne hezitas denunci la defendantojn de birdoj al la polico (hej! Kiel en 40 ... Jen ankoraŭ komuna punkto). Ĉio estas farita por instigi malamon. " la oficialuloj parolas pri "troleĝatecon de la kolomboj", hmm ... ĉirkaŭ 80.000, tio estas unu por 25 homoj, "kiu kaŭzas damaĝon al la medio", pledas siaflanke la urbestro de Parizo. (Ha! Tiu fama "medio" integriso eh! Ankaŭ pri tio mi skribis artikolon en Sennaciulo !) Konsekvenco: "donacantoj de mangaĵoj suferas senkreditecon. Ili sentas, ke ili estas ĉasataj. Subite ili estas pli diskretaj, eliras prefere nokte, en izolitaj lokoj

kaj funkcias pli rapide. Sed, malgraŭ ĉio, ili ne haltos. "Ĉar se ili havas la senton esti establintaj veran komunikadon kun la birdoj aŭ katoj, ili sentas sin eĉ pli investitaj de respondeco. (jes! kiel la roluloj studitaj de Michel Terestchenko en sia elstara libro "un si fragile vernis d'humanité" (tiom fragila verniso el humaneco) ... ni estas ĉe la KORO de la "eideta" analizo de moralo, tie) "Plej ofte ili fariĝas nutristoj hazarde, ĵetante iam kelkajn panerojn, kaj poste iom post iom, ili rimarkas la malbonan farton de la kolomboj kaj estas kaptitaj kiel per radaro : ili ne plu povas liberigi sin. (sama rimarko, kiel Valdemar Langlet kiam li komencis disdoni falsajn pasportojn en Budapeŝto, ankaŭ persono koninda tiu Valdemar Langlet, sed eble ĉiuj esperantistoj konas la vivon de tiu heroo, ĉu ?)

"Multaj parolas pri "sakrala sindediĉo", multekosta en tempo kaj mono. Neeblas, ke tiuj, ekzemple, ferios. "Mi nutras ilin kun malbona konscienco, ofte min insultas maljunaj sinjorinoj kaj se mi devas foresti, mi ĉiam delegas mian funkcion", atestas anonime eleganta sesdekjarulo. Eĉ se ne ekzistas tipa figuro de nutristo, "ni renkontas plimulton de homoj pli ol 60-jaraj kaj virinoj, sed ankaŭ viroj, laborantaj homoj kiel emeritoj aŭ senlaboruloj", konkludas socisciencistaj esploristoj "Ĉi tiuj estas tute normalaj homoj, insistas Brigitte Marquet, kiu vidas pli da graco ol feko." (simile mi certas, ke estis antisemitoj inter la homoj, kiuj kaŝis judojn en 1940, ili simple vidis pli da homaro ol la uzuristo aŭ rasisma propagando) en mia blogero : "la heroaj maljunulinoj malamataj de la urbaj instancoj" La maljunulinoj, kiuj metas manĝaĵojn por nutri la vagantajn katojn nuntempe, estas herooj de la homa konscienco, kiel tiuj, kiuj kaŝis judojn nelge; ne forgesu, ankaŭ tio estis kontraŭleĝa. Ili estas unu el la avataroj de la mito de Antigono, pri kiu Gérard Mortier diras "Ĝia sola forto kuŝas en la kredo, ke" neskribitaj leĝoj "ne povas esti rompitaĵoj. Ĝi ne kreas ideologion sed ... ne povas agi alimaniere." ili estas "heroinoj fortaj ĉar ili estas vundeblaj" Li aldonas, bona observanto de la nunaj deviojn: "En ĉi tiuj tempoj de intertraktado, Antigono estas konsiderata kiel histeria kaj ŝiaj neskribitaj leĝoj kiel la kodo de sekto." "Zorgu ne distordi la unuan kategorian imperativon de praktika

racio laŭ Kantio kaj ne missaliĝu ĝin al : "Agu kvazaŭ la principo de via ago estus la sama kiel tiu de la leĝdonanto aŭ la leĝo de la lando"! (Hanna Arendt) Kiam Zygmunt Bauman alvokas "repatrujigi en la koron de niaj individuaj praktikoj tion, kion li nomas ekzilitaj aŭ ribelemaj emocioj, komencante per moralaj sentoj ... morala instinkto, la sola ebla fonto de aŭtonoma konduto." Kaj ĉi tiu tre bela kaj tre fundamenta frazo, kiu estas la plej homa kaj plej profunda morala fonto:

"Nia konscienco submetiĝas nur al la senpova aŭtoritato de la Alia." Nu ! Mi plialdonos, por plilarĝigi la perspektivon per ĝia alia konsistiga flanko, ĉi tiun fundamentan citaĵon de la kompatinda Claude Lévi-Strauss (kiu nun mortis, sola kaj malespera): "La sola espero, ke ĉiuj el ni ne estu traktataj kiel bestoj de siaj kunuloj, estas, ke ĉiuj, ili la unua, tuj spertas sin kiel suferantajn estaĵojn, kaj kulturas ĉi tiun taŭgecon en siaj koroj, kiu en la stato de naturo anstataŭas leĝojn, moroj, kaj virto, kaj sen kies praktikado ni ekkomprenas, ke en la stato de socio ne povas ekzisti nek leĝoj, nek moroj nek virto For de oferti sin al la homo kiel nostalgia rifuĝo, identigo kun ĉiuj formoj de vivo, komencante de la plej humilaj, ofertas al la homaro hodiaŭ la principon de ĉia saĝo. " Pri la alvoko al ribelo kontraŭ potenco ", kiu nun fariĝas problemo, ĝi male estas por multaj altvalora heredaĵo. Ĝis Eric Cantona, kiu antaŭ kelkaj jaroj deklaris, ke tio estas lia ideo pri la franca identeco. "Se de kiam kreiĝis la mondo ĉiuj homoj respektus ĉiujn leĝojn, ni ankoraŭ estus sklavoj." Civilizita manĝigado de bestoj malpermesita de la sovaĝuloj de urba totalismo, tio estas la priskribo en bona lingvo. Ni malfidu la politikan korektecon sen empatio! jen la granda leciono, rigardu median fundamentismon! (pri kiu mi skribis artikolon en Sennaciulo, vidu ĝin) ankoraŭ Giuseppe, kiu oferis sian apartamenton, sian socialan statuson por sia viscerala sindedico al tiuj vivantuloj estas heroo de la moralo, kiel Jesuo en sia tempo.

En unu el la filmetoj li diras iam :

"Estas tago, kiam la vero ekaperos, pli aŭ malpli frue"

verkis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

29>>> membroj aperis inter la demandoj.

UEA laŭ la estraro jam multe reduktis la sendadon de papera poŝto kaj multaj eldonaĵoj de UEA estas haveblaj ankaŭ en bita formo. Tamen por kelkaj personoj kaj regionoj de la mondo estas ankoraŭ bezonataj paperaj eldonaĵoj kaj kelkaj ankoraŭ volas paperajn eldonaĵojn.

Laŭ informoj de Jukka Pietiläinen

Fonto: <https://www.liberafolio.org/2021/07/24/fernando-maia-pretas-plu-gvidi-uea-n/>





Rakonto de Zija Ĉela el Albanio

**E**ble pro la aĝuleco, oni ne sciigis lin, ke ties bonamiko jam forpasis. Se li estus sciinta tion, neniu povus haltigi Donat aliĝi al la funebra procesio. Sed nek la ekscitantoj de la vilaĝo sin ne detenus, iel mokante lin. Interalie, la maljunulo imagis per si mem: “Estas ja alveninta la fantomo por konduki la fantomon!”

La veturado per aŭtilo ekde la municipa centro ĝis al Bruk, sia naskiĝvilaĝo, daŭris ĉirkaŭ unu horon. Sur la antaŭa sidloko, tute senvole, Donat Shtjefni levis manplaton kaj, de fojo al fojo, skuadis ĝin kvazaŭ naztukon antaŭ sia vizaĝon, kvazaŭ li volus forigi ian logeman vidaĵon, kiu restis en ties okuloj. La pranepo rigardis lin tra la speguleto, sed ne kuraĝis alparoli lin, ĉar, kion ajn, li dirus, la blankbarbulo povus konsideri ian kaŝitan subridon.

Des pli ke la maljunulo ankoraŭ priatentis la mokaĵojn kaj la ekscitaĵojn de la homoj.

Ĉu ili sin montrus tiel senhontemaj, por eksciti lin ankaŭ en la hejmo, kien li estis iranta por trinki la primortintan kafon?!

Por li tio ŝajnis ne malebla, ĉar “pri tuto kulpas ja Donat”, li murmuris portante la pezon sur siaj ŝultroj. “Sed ankaŭ tiu kanajlo, la doktoro”, li malpezigis unu ŝultron.

En la cetera parto de la vojo li rememoris tuton jam okazintan.

En la sezonaj agrolaboroj, estante bonaj najbaroj, Donat Shtjefni kaj Pashk Shasi helpadis unu la alian. Post la rikoltoj de tiu jaro, kiam la somera varmego longis, al Donat ekaperis ia ruĝiĝo en la okuloj kio ne malperis. La najbarino, la dommastrino, spertema popolkuracisto, konis la medikamenton. Ĉe la komunaj bariloj, ŝi donis al Donat glaseton da lakto. Ĉi tiu uzis ĝin laŭ la konsilo, konsiderante ĝin azeninan lakton

(tiel ŝi estis dirinta lin). Sed la ruĝiĝo ne malaperis. Tiam, ĉe la popolkuracistino naskiĝis la dubo, ke transpasinte de mano al mano, la efiko de la medikamento estis malfortiĝinta.

Kaj, por ke oni ne perdu ĝin denove, ŝi babilis kun sia filo, kiu ĵus patriĝis.

Tiel ili invitis la najbaron en ilia hejmo. Post kiam la popolkuracistino petis lin ekkuŝi kaj malfermegi la okulojn, la novedzino malbutonigis sian ĉemizon kaj eligis sian pezan mamon, portante ĝin per manplato desube, kvazaŭ ĝi estus ledsaketo lavita per oro. Al la paciento ekfulmis en la kapo: “Pli belan kozon miaj okuloj jam ne vidis kaj eble neniam vidos”. Sed tiumomente aŭdiĝis la lamento de la bebo, kaj kvankam pene, li transpasis la cerban ardiĝon. Tamen, kiam la novedzino fleksis sin sur lian vizaĝon, instiktive la buŝo de Bonat iome malfermiĝis.

- Okuloj, okuloj!- alkriis lin la popolkuracistino.- Mi petis vin malfermi la okulojn, ne la buŝon!

La naiva junulo, ankoraŭ virga kaj ne alkutimiĝinta al tiaj kunfrontiĝoj, ege hontemis. Sed, kvankam li ruĝiĝis ĝis la arko de la antaŭkolo, li tuj obeis. Dum la virino post akuŝo ne haltis, elpremante la mamon, ŝi surĵetis kvin gutojn da lakto sur unu okulon, kvin gutojn sur la alian. Ĝis la semajnofino, difinis la limdaton la popolkuracistino, ĉiutage po dek gutojn sur ambaŭ okuloj. Kaj ne penu vi mem, ĉar mi kaj la novedzino alvenos al via hejmo. Ĉu bone, Pashk? Turniĝis ŝi al sia filo, kvazaŭ petante permeson de li. La alia kapskuis kaj eble pro tiu aprobo, Pashk konsideris la najbaron kiel unu inter plej proksimaj fidelaj amikoj siaj.

Pasis multaj jaroj kaj ŝajnis ke la okazintaĵo estis jam forgesita, sed ĉe Donat aperis stranga gesto. En la hejmo aŭ sur la strato, sole aŭ akompanite, li subite levis la manon antaŭ la vizaĝo kaj skuis ĝin kvazaŭ naztukon, kvazaŭ li sentus nebuliĝon en la okuloj. Multaj homoj demandis lin pri tio, sed neniu ricevis respondon. Aparte al sia edzino, Eta Antoneto (ekde la unua nuptonokto li eksentis seniluziigita pro tiu korpo), li rediris ŝin abrupte: “Kion vi havas, kion vi vidas sur miaj okuloj?!”

Li jam estis translokiĝinta kun la familio en la municipa centro kaj post multa tempo, li mem miris kial tiu okulobcesio ne malaperis. Nokte, kiam li sonĝis lumigan lunon, kvazaŭ ledsaketo plenplena je luma cidro, sed ankaŭ kun dianta tufo intere, li findecidis. Iun matenon, li iris al la kuracisto. Kion vi plendas, sinjoro? Mi sentas ion en miaj okuloj. Kian aĝon vi havas? Ĉirkaŭ sepdekjara. Kaj kia estas tio? Ĉi tie Donat sin detenis. Ĉu li konfesus la tutan veron? Li ne havis



tempon por plu longe heziti, ĉar la kuracisto denove demandis kaj tiam Donat parolis kvazaŭ interdente.

- Ŝajnas min, fojfoje, ke mi vidas fronte al mia vizaĝo bebon. Ĉi tiu bebo proksimiĝas kaj proksimiĝas, ĝis ĝi kovras miajn okulojn kaj tiam mi ne plu povas vidi ion alian.

- Vi diras pri etan bebon?! ekmiris la kuracisto.
- Mi parolas pri bebo,- decideme rediris Donat.
- Kaj vi estas edzigitaj?
- Mi havas gefilojn kaj genepojn.
- Euuu!- ekkriis senvole la kuracisto.- Ĉe vi estas

returnita jam la dua juneco, mia paĉjo, tial vi deziras denove bebon!

Ĵus elirinte sur la strato, por pereigi ĉiun spuraĵon, Donat disŝiris la recepton. Sed la spuraĵoj tamen restis, ĉar la kuracisto babilis kun siaj kolegoj pri tiu strangaĵo kaj pri la ŝerco farita de li. La vortoj transpasis de unu al la alia kaj ili atingis Bruk. Ĵus Donat piedmetis en sia naskiĝvilaĝo, la babilaĉuloj atendis lin kun mokaĵoj.

- "Ah, la kuracisto, tiu kanajlo, forprenis de mi la honoron!", murmuris la povrulo. Tamen, li eltenis kaj eltenis, poste ĉesigis severe la pilgrimadon en sia nostalgieca naskiĝvilaĝo.

Ĉiuj tiuj kozoj preterpasis en lia menso, ĝis li elaŭtiĝis en la korto de la forpasinto. Kiam la filo de sia bonamiko vidis lin starante, iel flankeniĝinta al ties bastono, kun la vizaĝmembrano kvazaŭ cigaredpapero kaj la vestoj malstriktaj surkorpe, li hastis aliri lin fronte, kvazaŭ se li malfruiĝus, tiun maljunulaĉon povus faligi eĉ la venteto. Sed kiam li kontraŭstariĝis al la pranepo, kiu volis disciplinante ties tremantajn blankajn harojn, la maljunulo ne akceptis sin apogi ĉebrake al tiu.

- Kio okazis al via patro?- demandis li unuspire.

Li degelis kvazaŭ kandelo,- resumis pri la morto la heredinto.- Ĉi lastajn monatojn, la lito fariĝis kandelingo kie li degelis.

- Ho, la feliĉulo li estis!,- suspiris la konsolulo.- En tiu aĝo, li forpasis rekte al la Paradizo.

Por bonvenigi la frutempan patran najbaron, la heredinto estis invitinta ankaŭ du siajn kuzojn. Trinkinte la kafon kun glaseto da brando, spontanee la konversacio koncentriĝis pri la aĝo kaj la homa korpo. La kuzo, kiu plej kapablis paroli, alparolis:

- Koncerne la aĝon, preskaŭ li samaĝis al Donat. Eble vi sinjoro havas ok aŭ naŭ malpli jaroj.

- Kion vi diras, ĉu?!- eksaltis Donat Shtjefni, kvazaŭ oni alĵetus lin naŭ ardiĝintajn karbojn el la kameno.- Nur kvin jaroj estas la diferenco de niaj aĝoj.

- Ĉu vi estas certa pri via aĝo?- insistis la alia.

Kvankam li atendis fulman respondon, Donat iom malfruiĝis, skuante la manplaton antaŭ la okuloj.

- Ĉu mi estas certa, vi demandis? Kiel la pano

manĝata de mi! Nu, diru vi, kiom jaroj vivis Pashk?

Verŝajne, la kuzo ne estis mem certa, ĉar li fermis la buŝon. Tiam parolis la heredinto.

- Mia patro vivis cent kaj tri jarojn, kvar monatojn, du semajnojn kaj...

- Lasu la reston,- interrompis lin Donato.- Sed ankaŭ vi eraras.

- Kial do mi eraras?

- Ĉar transpasinte la jarcenton, kiel oni povas nombri la jarojn tiel?! Ĉu vi aŭdis ie ajn ke oni diru: Unu jarcenton kaj unu, unu jarcenton kaj du, unu jarcenton kaj tri...Nu, ni turniĝu al mia aĝo. Kiam oni donis al mi medikamenton en ĉi tiu hejmo, Pashk estis dudek sep, dum mi estis dudek du. Nun vi mem elkalkulu pri mia aĝo.

La kalkulado estis simpla nombrado, cent tri minus kvin. Sed eble pro ŝerco, la kuzo komencis denove paroli. Li konsideris tion komplikan kalkuladon kaj kvazaŭ li estus babilante kun kadukiĝinta ĉevalaĉo, ekridegaĉis. Tiel maldolĉa estis la ridegaĉo, kiel al Donat ŝajnis ke la aliulo estis murmurante subvoĉe tiun babilaĉon, kion li aŭdis ofte ĉe la junuloj kaj eble postdorse ne ŝparis lin eĉ la samgentuloj: "Furzu, furzu por ke vi liberiĝu, maljunulo!"

Atendante ke la dommastro, la filo de la forpasinto, disciplinigu sian kuzon per peza riproĉo, subite ekridetis ankaŭ la heredinto. Donat ne povus kredi tion. Li algapis arde lin, sed je diablo intervenis la neeltenebla gesto, kio pli malbone turbulis ties staton. Dum kelkaj momentoj li restis kiel mutulo, skuante la manplaton antaŭ la vizaĝo per la akcelita movo. Kaj en ĉi tiu vakuo profitokazis por ekmoki la alia kuzo, kiu ekcitigis lin demandante:

- Ĉu estas io en via okulo?

Ĉar la stato de stultulo longis, kvazaŭ por rekonsciigi lin, la heredinto sin montris pli diskreta, sed ankaŭ pli ekscitiga:

- Ĉu vi vidas iun bebon, sinjoro?

Donat sentis haŭtŝiriĝon. Kiel li respondu al tiu aĉulo, ĉu li diru diskrete la veron?! Ĉifoje, kompare al la hezitado antaŭ la kuracisto, la skuiĝo estis eksterordinara. Tial, antaŭ ol paroli, sian tutan korpon envolvis nerva ventego.

- Jes, ja, bebo restis en mia okulo. Kaj ĉi tiu bebo estas vi,- li etendis sian fingron al la heredinto.- Estas vi, ĉar kiam via patrino donis al mi mamlakton, vi estis ĵusnakito.

Ankaŭ revenante, tra la speguleto, la pranepo komprenis ke la avo ankoraŭ cerbumadis. Kaj li ne eraris. Rigardante ie trans la aŭtila vitro, Donat Shtjefni ŝajnis kvazaŭ frostiĝinta. Forgesante ke ĉebrake estis atestulo, de fojo al fojo, la voĉo lia eksaltis spontanee: "Kial ne kovris mian spiradon sed la okulojn?! La

>>14

## Ŝercoj



### TRAFADIETO

Kruko: Mi sentas min tre bonstata ĉivespere. Mi zorge sekvis la novan dieton. Ĉimatene mi manĝis nur

senbuteran rostpanon. Nur salaton por la tagmanĝo. Kaj nur malpezan vespermanĝon kun salmo kaj rizo. Jozefino: Vidu, do! Manĝi ĝuste bonstatigas vin. Kruko: Ne vere. Mi kredas ke estas la tri glasoj da vino kiujn mi drinkis!

\*\*\*

### NOVNASKITO

S-ino Trakap, la patrino de eta Toĉjo, estas graveda. S-ino Trakap: Nu, Toĉjo, kiun vi preferus? Frateton aŭ fratineton?

Toĉjo: Ĉu ne eblus hundido?

\*\*\*

### SOLVI PROBLEMOJN

Baniko: Hieraŭ, mi solvis ĉiujn mondoproblemojn.

Kruko: Ĉu vere? Kiel vi faris tion?

Baniko: Ni estis grupo da amikoj. Ni sidis antaŭ la kameno, trinkante bieron, kaj solvis ĉiujn problemojn en la mondo -- krom unu.

Kruko: Ĉiujn krom unu?

Baniko: Jes -- kiel igi ĉiujn homojn en la mondo fari ĉion precize kiel ni decidis.

\*\*\*

tradukis **Rikardo Cash** el Francio  
publikigita kun lia permeso

Fonto: [esperanto-anekdotoj@googlegroups.com](mailto:esperanto-anekdotoj@googlegroups.com)

\*\*\*




## Krucvortenigmo



### HORIZONTALAJ DIFINOJ ( → )

- Intence difekti maŝinon; 6. Alimaniere; 11. Hako post hako estas la plej efika \_\_\_ (Zamenhof); 12. Tondo, incizo; 13. Teksaĵo uzata por kapti fiŝojn; 14. Ĉefurbo de Aŭstrio; 15. Membro de grupo; 16. Grimpa aŭ volviĝanta planto; 17. Unua duono de Odro.; 18. La litero J; 19. Ĝi enhavas paĝojn; 20. Patro de patro; 21. Roko, ŝtono; 22. Kolektivan; 23. Kia estas via laboro, tia estas via \_\_\_ (Zamenhof); 25. Organo de la vidkapablo; 26. La ĉefa dio en la ĝermana mitologio; 27. Teleron.



### VERTIKALAJ DIFINOJ ( ↓ )

- Ĉefurbo de Bosnio-Hercegovino; 2. Ĉefurbo de Grekio; 3. Frapo; 4. Sepo, \_\_\_, naŭo; 5. La litero T; 6. Loko, en la centro de cirko, rezervita por bataloj; 7. Felo de ŝafoj; 8. Filino de Kadmo; 9. Partikulo, signifanta insiston pri la realeco de neatendita fakto; 10. Ĉefurbon de la Unuiĝinta Reĝlando; 12. Speco de alta turbano; 14. Vibrado, tremo; 16. Mezurunuo de volumeno simbolita per L; 17. Kurbo, kiu iel similas

- elipson; 19. Tiu flanko de ŝipo, kiu estas ŝirmita kontraŭ la vento (akuzativo); 20. Prepozicio esprimanta la netuŝan proksimecon; 21. Partikulo uzata por formi la komparativon; 22. Sepa, \_\_\_, naŭa; 24. Anno Domini; 25. Partikulo, esprimanta diferencon.

Fonto: Semajno de Enigmoj #7  
<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en paĝo 31)

**P**asintaj monatoj rapide forflugis. Tiom da nekredabaj novaĵoj ni aŭdis. Mortis miloj da homoj pro covid19 eĉ niaj konatuloj. Ŝanĝiĝis feliĉo kaj malĝojo samkiel en naturo ŝanĝis sezonoj! Ĉio aspektis normala sed aŭdiĝis novaj sonoj malsamaj al tiuj regantaj de oficiuloj.

- Sara, ne diru al mi, ke vi jam kvinfoje legas tiun leteron! - forta voĉe Petro vekigis ŝin el sorĉa lega revado.

- Ho, mi estis multe feliĉa ricevinte la leteron. Ni tute forgesis pri s-ro Tomo kaj lia filo Niki. Ŝajnas, ke ili vere senpacience atendas nian grupeton vizitonta ilin por ferii 10 tagojn kiel ili afable promesis al ni.

- Jes, sed tio okazis antaŭ tiu damnita viruso. Mi pensis ke ili tute forgesis nin. -diris Petro kies serioza mieno ŝanĝiĝis kaj liaj vangoj iomete ruĝiĝis.

Ili sidis en la ĉambro vidalvide kaj tre bone komprenis kial la ĉambro nun aspektis kvazaŭ belega salono. Io nevidebla, ne travivita ŝvebis en la malnova ĉambro donacante novanbrilon en la ĉambro.

- Ĉu ekzistas feinoj, bonaj sorĉistinoj? - demandis lin Sara haltigante la magian silenton.

- Mi demandos vin ion alian, ekzemple: Ĉu vi kredas, ke ekzistas eksterteruloj? - diris Petro levigante el la komforta fotelo.

Sara estis surprizita. Tio montris ŝiaj ne nur larĝe malfermitaj okuloj sed ankaŭ ŝia buŝo gapita.

- Verdire, mi multe pensadis pri tio. Rompis mian kapon sed nenion mi fine konkludis. Ja vere iam mi kredas, ke iuj povas legi miajn pensojn, kaj iam mi povas vidi homojn. iliajn vizaĝojn surfote, kiun mi faris dum grandaj eventoj...

- Sara, ĉu vi forgesis kiam vi montris la foton al mi kie du geknaboj ŝvingis en la korto de la najbara domo? - subite Petro skuis ŝin, tenante mane ŝiajn ŝultrojn.

- Vere, mi memoras tion, precipe poste kiam ni esploris tiun domon kaj eksciis, ke tie vere loĝis geknaboj, kiuj tre ŝatis ŝvingadi.

Tiam sen anonciĝi per domosonorilo brue kie vento furioza enflugis ĉambron Urso kaj Bluokulaj klaŭno.

- Ĝis kiam ni devas atendi vin? Ĉu ni ne interkonsentis, ke ni kuniros vidi Tomon kaj la knabon Niki? La demando ŝvebis aere.

Sara ellasis la leteron fali surteron kaj apenaŭ diris ŝi;

- Kiel vi sciis pri Tomo kaj Niki. Neniu diris tion al vi!!!

- Neniu diris sed vi promesis, ke ni vizitos ilin - diris Petro anstataŭ la Bluokula klaŭno. Tuj mi telefonos al s-ro Tomo, ke ni venos post la morgaŭa tago. Dirite farite.

Jen, niaj gaja grupo ferias ĉe marbordo. La duonparalizita knabo Niki muzikis tuttage dum niaj amikoj la granda urso, Flava hundeto Zuĉko, muso Mika, Bluokula klaŭno, katoj de Jana amuziĝis ĉiujn sur la vaste longa sabla plaĝo.

Vespere ni sidadis ekstere gaje kantante kaj senlace dancante. Jana kaj Pavlo distris nin recitinte ampoemojn.

Sara rigardis ĉielon ekpensante sian sekretan deziron, kiam alflugis blanka kolombo starante sur la tegmenton de la najbara domo.

Sara ekŝvingis mane al la kolombo. Ĝi mire staris kviete rigardante al ŝia direkto kaj subite forflugis alten al la jam aperinta pala luno.


- Jen, rigardu, kiel malrapide falas unu brila steleto! - kriis Petro montrante al la falinta stelo.

Sara sorĉe rigardis la falintan stelon. Ŝi estis sciigita en sia juneco, ke tio signifas, ke iu spirito de bona amiko nin forlasas...

Al neniu ŝi diris tion. Ĉi vespere ĉiuj amuziĝis. Lasu ilin resti tiaj kun ridoj sur lipoj, decidis ŝi.

(fino)

verkis kaj sendis **Miriĉ Jadranka** el Serbio



**31>>** **protekti:** defendi kontraŭ danĝeroj.  
**provinco:** regiono de lando aŭ ŝtato, kiu mem prizorgas siajn publikajn servojn, sub direktado de la centra registaro.  
**regno:** ŝtato, lando, reĝlando.  
**ripari:** rebonigi rompitan aŭ nefunkciantan aferon.  
**serpentumi:** iri laŭ tre malrekta vojo, laŭ la sama maniero kiel serpento.  
**tribo:** homgrupo kun komunaj pragepatroj; subdividaĵo

de popolo.  
**Unesko:** Organizaĵo de UN por Edukado, Scienco kaj Kulturo.  
 Publikigita laŭ propono kaj permeso de **Anna Löwenstein**  
 Fonto: <https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/la-granda-muro-de-%C4%89inio-r236/>

Estas mi sonorileto  
ĉe la kolo de katino  
traserĉanta la manĝaĵojn  
ĝis la doma tubkulmino.

Estas mi klas-sonorilo  
sur la instruista tablo:  
mi silentas sub la tuja  
lia trema tuŝ-afablo.

Mi, tombeja sonorilo,  
nur malĝojon anoncadas,  
kiam mortoj en tembejon  
per marŝet' urĝe paradas.

Mi ne povas plialtiĝi  
ol preĝeja kampanilo  
por alvoki al la preĝo,  
mi pez-dika sonorilo.

Estas mi sonorileto  
ĉe l'serĉanta kapra kolo  
sin klinanta por manĝeti  
eĉ la florojn laŭ la volo.

Estas mi sonoril' klera  
ĉe la enirejo doma:  
mi spionas l'alvenantojn  
per okulo aŭtonoma.

Mi kaj miaj kamaradoj  
akordiĝas kalendare  
por anonci l'Novan Jaron  
unufoje ĉiujare.

poemo de **Therese Abela** \*

tradukis kaj sendis  
**Carmel Mallia** el Malto



\* **Therese Abela** Esperantistino;  
ĉifoje ŝi verkis en la malta. Tiajn  
pometojn ŝi publikigis en maltajn  
revuojn.

La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj  
-- de Vytautas Petkevičius

tradukis kaj sendis  
**Antanas Vaitkevičius** el Litovio

4. **Glut-Glutaĵo**

**G**lano rekonsciiĝis en malgranda herbejo, frotis siajn okulojn per pugnoj kaj ĉirkaŭrigardis. La loko estis malgajiga kaj tute nekonata. Subite li rememoris sian kverelon kun Cikonio kaj ekploris per malvarmaj larmoj de kolero kaj malesperiĝo.

Li iomete ploris, aŭskultis, ekploregis pli laŭte, tamen neniu hastis por konsoli lin. Tiam Glano ekkriegis per la tuta potenco de sia gorĝo, li kriis kaj kriis ĝis kiam li sentis sub si grandegan salan flakon. Timante droni en siaj larmoj, li translokiĝis sur sekan altaĵeton kaj daŭre ploraĉis. Tamen kvazaŭ speciale finiĝis larmoj. La petolulo iomete plu ploretis kaj frotinte la okulojn per maniko, ekiris laŭ formika vojeto.

Li iris nerapide, ĉirkaŭrigardante, tamen lia rigardo trafis nenion: ĉirkaŭe etendiĝis malgajiga ebenaĵo surkreskinta per maldensa herbaro. Mallumiĝis. Glano tranoktis sub la nuda ĉielo kaj matene li eksentis grandegan malsaton. Sed ĉirkaŭe estis nenio manĝebla kaj nenio trinkebla. Satiĝi oni povis nur per terbuloj.

La duan tagon de la marŝado lia ventro plisilentiĝis kaj pene bruetis:

- Almenaŭ ian ro-ro-rosguteton!

La trian tagon la stomako de Glano kuntiriĝis, gliuĝis al la dorso kaj tute silentiĝis. La okuloj mallumiĝis. La vido de la vojeto duobliĝis. La gamboj tremis. Neĝisatendinte la nokton, la malgranda

vojaĝanto ekripozis sub la folio de Plantago kaj tuj profundiĝis en dormon. Matene li jam nenien deziris iri. Li eĉ manĝi ne deziris.

- Paĉjo, paĉjo, mi ĉiam obeos vin, - senlarme ploris Glano.

Plantago kompatis Glanon.

- Leviĝu vi, maltaŭgulo, kontraŭe vi pereos,- li diris. - Iru nazdirekte, ĝis kiam vi atingos malnovan ĝardenon. Tie ĉio abundas, eĉ birda lakto. Nur gardu sin, multaj el tie ne revenis.

- Estu tiel, - mansvingis Glano.- Mi tutegale ne kapablas iri.

- Kaj kion vi havas verŝitan en la konkon?

- Tio estas inko, netrinkebla.

- Faru siavole, - respondis Plantago.

Glano longe turnadis la inkujon en siaj manoj kaj finfine decidis gluteti kelkajn gutojn. Acidiĝinta inko de viburnaj beroj nur turnigis liajn vangojn kaj eĉ pliintensigis lian soifon.

Iel li leviĝis de la grundo kaj pli ripozante ol irante, li sin trenis al malnova heĝo ĉirkaŭkreskinta per sovaĝaj rozoj. Malantaŭ ĝi aŭdiĝis ies akra krio:

- Mi ne volas, mi ne manĝos! Pli bone mi mortu! Donu al mi glut-glutaĵon!

- Kiu ĉi-tie parolas pri manĝaĵo? - atentiĝis Glano kaj, gratinte la vizaĝon, el ĉiuj siaj fortoj li elŝovis la kapon tra la heĝo.

En la mezo de bela ĝardeno staris mirinda palaco,



konstruita el diverskoloraj perlamotaj konkaj kaj sukceso. En la korto siblante ŝprucis fontoj de gasakvo kaj fontanoj de diversaj sukcoj. Tra la malfermitaj fenestroj de la palaco disiĝis bongustaj odoroj de rostaĵoj, pro kiuj Glano eklekis kaj ne sukcesis gluti suprenlevantan salivon.

Tiutempe tra la palaca fenestro elsaltis ia buleto kaj tutrapide kuris al la tablo kovrita per manĝaĵoj. Post li kuris seka, hirtiĝinta Pinglino kaj dika, kurbgamba Strobilo. Kurante ili ambaŭ petegis:

- Akvokreseto, filĉjo, nur iomete, nur unu kulereton!

- Mi deziras Glut-glutaĵon, - kriegis la buleto, kuregante ĉirkaŭ la tablo.

Subite Pinglino haltis kaj Strobilo, disŝirinte siajn brakojn daŭris persekutadon. La buleto ne atendis ĝis li estos kaptita. Li saltis sur la tablon kaj ekdefendis sin de la persekutantoj per kuketoj, konfitaĵoj kaj aliaj bongustaĵoj.

- Akvokreseto, ĉesu. Rigardu, kion mi kapablas. – Strobilo renversiĝis kelkfoje transkape kaj ekiris per siaj brakoj.

La militema kriegulo ŝatis tion. Li ekridis. Nur nun Glano perceptis, ke li estas malgranda strobilido, nomata de siaj gepatroj Akvokreso. Lia patro, nepripensante, kio estas farenda, iradis sur ĉiuj kvar korporinaĵoj kaj per sia nazo rulis ŝtonetojn.

- Nu, kaj nun unu kulereton, - diris Pinglino al la ridetanta filo, ŝovante al li ian-ajn vitran ujon.

- Mi ne deziras, mi ne bezonas! – akre rekriegis Akvokreso piedrapante. Kaptinte grandegan torton de la tablo, li ĵetis ĝin al la patrino.

- Kial vi nervozigas la infanon! – ekkoleris Strobilo. – Ne igu lin manĝi.

- Nu, li ne manĝu, - koncedis Pinglino.

- Vi estas ruzaj, vi trompos min, -ne konsentis la petolulo. – Ŝi ĵetu la ujon surgrunden, - ordonis li al la patrino.

- Mi metos ĝin sur la tablon, - diris Pinglino.

- Ne, frakasu ĝin, frakasu! – ekpiedrapis Akvokreso. Li kriegis ĝis kiam Pinglino forĵetis la ujon.

Bonodoroj de manĝaĵoj iomete plivigligis Glanon. Krome, li ege ekkoleris pro tio, ke li devas morti pro malsato, kiam ia-ajn dorlotulo povas senpune disĵetadi tiajn bongustajn manĝaĵojn. Glano ne plu suferis. Kurante al la strobilido, li kaptis liajn gambojn, tiris lin for de la tablo kaj kun ĉiuj siaj fortoj ekskuis lin.

- Kiel vi aŭdacas? Kiel viaj manoj leviĝas? – kaj ne trovante pluajn vortojn, ĵetegis la dorlotulon surgrunden. – Tio estas rekompenco pro ĉio!

Strobilo, ekvidinte neinvitan gaston batantan lian solan filon, atakis Glanon. Tiu evitis la frapon kaj, laŭ la Paser'a instruo, frapis lin sub liaj ripoj. La dikulo

bumfalis sur la vojeto, ke eĉ la grundo tremis.

Dum ili interbatiĝis, Pinglino kriegis je tuta potenco de sia gorĝo:

- Gardistoj! Gardistoj! Mortigis!..

Glano nenion vidis nek aŭdis. Alsaltinte al la tablo li manĝegis ĉion sen elekto. La unua gardisto kaptis liajn brakojn, tamen Glano skuis sin, forpuŝis lin turnantan transkape, kaj kaptis kruĉon dezirante per trinko malsuprenigi engorĝiĝintan buŝplenon. Nun atakis kelkaj gardistoj kaj tuj malaktivigis liajn brakojn. La kruĉo kun betulsuko falis kaj frakasiĝis. Glano intencis kapti ion-ajn plu, tamen la gardistoj firme ligis liajn brakojn per fibroj.

Rekonsciiĝinta Strobilo ordonis katenigi Glanon kaj alkroĉi lin al grandega mura ringo, kaj li mem mezurinte sekuran distancon de kvin paŝoj de Glano, sidiĝis por esplordemandado:

- Kio estas vi, rabisto aŭ ŝtelisto?

- Mi estas la plej klera doktoro de sciencoj kaj la korespondanto de la plej dikaj revuoj.

Strobilo sulkiĝis kaj piedrapis:

- Aŭskultu, karulo, en ĉi ĉirkaŭaĵo loĝas nur miaj sklavo, miaj soldatoj kaj miaj servistoj. Kaj ĉiuj aliaj estas fuĝistoj, rabistoj kaj ŝtelistoj. Do, kio estas vi: rabisto aŭ ŝtelisto?

Glano estis multfoje rololudinta rabistojn kaj li eĉ revis ekesti la hordestro, sed nun tiaj revoj estis tute sensencaj. Li silentis.

- Batu lin! – ordonis Strobilo. – Mia filo spertiĝu.

Kelkaj servistoj faligis lin surteren, sidiĝis sur lian kapon kaj gamboj kaj ekvergbatis lin.

- Rigardu, al vi estos ankaŭ simile, se vi nenion manĝos, - instruadis Pinglino sian solan dorlotulon.

Glano suferis kunpremite la dentojn kaj faris nenian sonon. Unuafoje en sia vivo li spertis tian teruran maljustecon: la strobilido ne manĝis, la strobilido petoladis kaj la maltaŭgaj servistoj batis lin, Glanon, dezirante timigi la malvirtulon. Ĉi aflikto tiom ĉagrenigis lin, ke li ne plu sin tenis suferi kaj silente ekploris. Li ploris sen larmoj.

Strobilo mansignis al la pli kaj pli energiaj servistoj, ordonante ĉesi la batadon kaj redemandis:

- Hodiaŭ mia filo Akvokreso sonĝis pri bongustega eksterlanda manĝaĵo, nomata glut-glutaĵo. Eble vi konas, kiel ĝi estas kuirata.

- Se mi eĉ konas, mi ne dirus, - ĵetrespondis Glano al li. – Vi estas plej grandaj malbravuloj kaj kanajloj, se vi naŭope batas unun kaj krome - katenigitan.

- Aldone batu lin pro nekono kaj pro malvolemo diri, - ordonis Strobilo.

La servistoj ne ŝparis siajn fortojn, nekompatante la batadon.

- Rigardu, same estos kun vi,- timigis ilin Pinglino.  
- Hieraŭ enlitigis vi mian fileton malsatan, tial li sonĝis diversajn manĝajn elpenaĵojn.

Glano silentis kaj mordis siajn lipojn.

Timiĝinta pro tia vidaĵo, Akvokreso sidiĝis ĉe la tablo kaj konsentis manĝi unu kuketon.

La familio solene tagmanĝis, kaj Glano restis katenigita, observata de la gardistoj, povante atingi neniun el la fontoj aŭ fontanoj. Dum la tuta tagmanĝo neniu ĵetis al li eĉ plej malgrandan panereton. Nedezirante rigardi al la manĝantoj, li turnis sin al la muro kaj forte kunpremis siajn pugnojn.

- Rigardu, karulino, kiel nia Akvokreseto manĝas, eĉ liaj oreloj balancadas. Verŝajne, antaŭ ĉiu

tagmanĝo la haŭto de ĉi rabisto devos esti batata, - ĝojis Strobilo.

- Nepre, - alparolis al li Pinglino, - kontraŭe nia fileto povas reperdi apetiton.

Pro tiuj vortoj la tuta korpo de Glano malglatiĝis kiel viransera haŭto.

(daŭrigota)

*"La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj" estas libro de litova verkisto Vytautas Petkevičius (1930 – 2008). Li estas sufiĉe konata kaj precipe fama pro siaj porinfanaj kreaĵoj.*

## Denove EKRA en Razgrad

La 18an – 19an de junio la Esperantista Domo pri kulturo en Razgrad okazigis por 32a fojo sian tradician feston EKRA – Esperantistan Krean Renkontiĝon "Abritus" en la Regiona biblioteko "Prof. Bojan Penev". Bedaŭrinde, pro la epidemio ni ne havis kiel tradicie multajn gastojn. Gastis nur Pavlin Boevski el Trojan – reprezentanto de la Centra estraro.

Komence la lernantino en 5a klaso Marija Stefanova deklamis la faman version de Zamenhof "Ho'mia kor", poste la juna kantisto Tekin Zekiriev, lernanto en 7a klaso, salutis la ĉeestantojn per belaj kantoj.

Per kelkaj salutvortoj D. Kateva, prezidanto de la Esperantista Domo inaŭguris la feston kaj tralegis kelkajn salutmesaĝojn de amikoj – esperantistoj: Hasan Jakub, Radi Radev kaj Kanjo Kanev el Galabovo, Margarita Savova el Ruse. Pavlin Boevski salutis la partoprenantojn je la nomo de la Estraro.

S-ino Maĝarova – la prezidanto de la ĵurio ( membroj: Josip Pleadin fama esperantisto kaj eldonisto el Kroatio kaj Vasil Kadifeli – turka esperantisto, redaktoro kaj eldonisto de la bonega esperanta revuo "Turka Stelo") anoncis la rezultojn de la Internacia konkurso pri originala esperanta poezio kaj humuro.

Partoprenis 13 geesperantistoj el 10 landoj kaj 3 kontinentoj.

Honoran premion ricevis Elena Popova el Dobriĉ, Bulgario pro sia multfoja, diversĝenra kaj altnivela partopreno en EKRA kaj okaze de ŝia 85a-jariĝo.



ELENA POPOVA, BULGARIO *Helga Pleadin* 2021

## humuraĵo de Laimundas Abromas el Litovio

Specialan premion ricevis Evgenij Georgiev el Kazahio. Ĝoigis nin la unua partopreno de Leonid Turkadze el Usono, al kiu estis aljuĝita la Unua premio.

D. Kateva –ano de la ĵurio de la konkurso pri traduko el bulgara (prezidanto Georgi Mihalkov – elstara bulgara esperantisto kaj verkisto ) anoncis la rezultojn:



Unuan premion ricevis Evgenij Georgiev el Kazahio. La ĵurio aljuĝis du Duajn premiojn: al Georgi Mihjlov el Sofio kaj Hasan Jakub el Omurtag.

La dua parto de la solenaĵo estis dediĉita al la verkaro de Elena Popova. Iv. Maĝarova prezentis ŝian vivon, hajko-poezion, versojn por infanoj, poeziajn rakontojn. Marija Stefanova kaj Bianka Todorova-lernantinoj en 5a klaso legis bulgarlingve kaj esperante elektitajn de ili versojn. Dimitrinka Mihajlova kaj Keranka Toteva legis hajko-poezion. Cvetanka Marinova tralegis "Rakonton de unu fonto". Kateva voĉlegis esperante fragmenton el plej nova libro de E. Popova "Leteroj el Kosmo" - "Konversacion kun la Luno

Fine la ĉeestantoj ĝuis la plenumadon de la vokala grupo "Sopiro" .

La 19an de junio kadre de EKRA antaŭtagmeze okazis solenaĵo, dediĉita al la 85a jariĝo de elstara

razgrada esperanta instruistino kaj aktivulino Radka Stojanova. Ĉeestis multaj gastoj – ŝiaj eksaj gelernantoj el baza lernejo “Hristo Botev”, kie s-ino Stojanova laboris de 1963 ĝis 1990, kiam ŝi emeritiĝis, gekursanoj, gefiloj kaj genepoj. Ili salutis kore la amatan instruistininon, donacis multajn florojn kaj donacojn. Estis prezentita ŝia libro “Unu vivo ne sufiĉas”. Kalinka Raĉeva – la filino, riĉigis la feston per belaj kantoj.

**Dimitrinka KATEVA**



## EKRA2021 - Pro la Najlo

La mondon regas ni, viroj, sed la virinoj regas nin. Ni, viroj, eltrinkas bieron, interbatiĝas, – tiaj estas viraj kutimoj. La virinoj tion neniam komprenos.

Viroj kaj virinoj estas malsamaj kaj neniu pri tio disputas, – necesas nur pripalpi, komence sin mem, poste reprezentanton de alia seksspeco. Kaj viroj kaj virinoj tion faras de pratempo kaj konkludo estas ĉiam tia sama: estas iuspecaj diferencoj, plej ofte sufiĉe agrablaj. Tamen oni diferencas ne nur laŭaspekte, sed diferencas ankaŭ vidpunkto, koncepto, konsidero kaj tio ne estas malfacile rimarkebla. Virinoj estas fortaj! Mi ĉiam timis ilin. Pri mi la edzino diras: „Mia gapulo“. Mi koleras kaj kontraŭas :

– „Mi estas gapulo delonge.“

Mi estis gapulo eĉ tiam, kiam ankoraŭ ne konis mian estontan edzinon. Alimaniere – ĉu mi interkonatiĝus, edziĝus, estus loĝinta kune? Al mi ne plaĉas, kiam ŝi parolas pri mi kaj nenion pensas, des pli ĉe fremdaj homoj.

– Enbatu najlon sur la muron, – jen kion ŝi diris unufoje al mi.

– Ĉu tio necesas ? – disputis mi.

– Portreton necesas pendigi.

– Kia utilo estas de tiuj portretoj..., – sed ekvidinte, ke tie sur la bildo estas mem Doktoro Ludoviko Zamenhof, mi fermis buŝon: „Majstro...!“ – mi kliniĝis preskaŭ ĝistere. Longe mi tiam najlis... ĝis la muro ruiniĝis... Poste sekvis vortoj:

– Se vi ne riparos gladilon – mi batmortigos vin.

Kaj sekvis silento. Mi ne dubis, ke sian minacon ŝi efektivigos kaj tion faros per tiu sama gladilo. La homoj nuntempe ege kruelas kaj mortigas unu la alian per la plej brutecaj manieroj, eĉ pro la et-eta kaŭzo, ankaŭ eĉ senkaŭze. Sed kiel mi riparu ĝin? Mi estas sensperta: tiaj aĵoj neniam min interesis kaj neniam (se mi restos viva) interesos. La unuan penson – forĵeti la gladilon en konteneron de forĵetaĵoj – mi rifuzis. Kio sekvos el tio? Multe da mastrumaj iloj oni devus forĵeti, ĉar en kuirejo abundas danĝeraj iloj. Eĉ ordinara ĉerpilo en ŝiaj

## humuraĵo de Laimundas Abromas el Litovio

manoj aspektas kiel tomahoko... Mi rigardas al gladilo, kiu kuŝas sur la tablo kaj neniel povas kompreni: pro kio, tiom multe da homoj interesiĝas pri tekniko? Iu eĉ duonon de la vivo pasigas ĉe la aŭto, malferminte ĝian antaŭon. Kaj venas en mian kapon diversaj pensoj. Mi forprenis kovrileton de la gladilo (elŝraŭbis mi bolteton – nenio eksterordinara! Vere , nun ĝi ne plu enŝraŭbiĝas, krome io forfalis...)



Longe mi rigardisen gladilan internon... Kompreneble, venis enkapan iuj ajn pensoj. Ĉiuj observoj donas certajn utilojn. Mi ne povas porti ĝin en riparejon por ripari, ĉar ŝi postulas, ke mi riparu mem. Ne pro tio, ke tio ĉi kaŭzas certajn elspezojn, simple volas ŝi humiligi min... Necesas ion fari. Forkuri? Sed ĉu malproksimen mi forkuros? Fuĝi trans la horizonton?... Starante ĉe la pordo, mi pensis: foriri aŭ ne? Se foriri, do kien? Ĉiuj miaj amikoj jam antaŭlonge iĝis aliaj homoj kaj mi ilin jam ne konas. Se mi ne foriros, mi devos resti kun mia virino. Momente jam estis nenio por pridiskuti. Mi vestis min, surmetis ĉapelon kaj forlasis la hejmon. Verŝajne pro ekscitiĝo mi vojon ne vidis, ĉar ne atendite mi ekvidis min sur arbostumpo sidante. La ĉirkaŭaĵo al mi ne konata... Nun, kiam mi sidas tiele unu, des pli kun ĉapelo... ŝajne mi devus aspekti interesa deflanke rigardante... Al mi tiel ŝajnas... Sed pro kio penetriĝas tio en mian kapon? Kio okazas? Ĉar nun plej gravas – pripensi, kion mi povas fari, por ke ĉiuj ekvidu, kia mi estas kaj komprenu, ke en la vivo la plej gravas ne tio... Pri kio mi ĉi tie?... Jen eksidas mi kaj jam, ŝajne, komencas cerbumi, sed enkaŭpe iaj devizoj... kantoj sonas... Aŭ entute nenio... Sed ne tio plej gravas... Tamen kio plej gravas?... Mi estante sola parolas kun mi aŭ ridas, sed kiam necesas... Sed plej bone – silenti. Sed tiam ĉiuj rigardas kaj vidas min kiel gapulon.... Ĉu paroli tion ĉi? Ne, samideanoj, plu tiel ne eblas? En la vivo plej gravas io alia, kaj mi interalie scias, kio estas tio... Al mi plaĉas la homoj, neniam perdantaj optimismon. Mi rememoris mian avon, kiu



ankaŭ estis esperantisto. Estante en la aĝo de 90 jaroj, tiu asertis, ke Esperanto ĉiutage plifortiĝas kaj esperantistoj plu nombriĝas, matene de 95-a naskiĝtago li obstine persvadis, ke post jardeko ni, interalie, precipe substrekante la vorton „ni“, venkos. Tiun saman vesperon nia avo forlasis nin... Ĝis mi pensis, kion fari, ekaperis iu ulo.

– Ĉu ĉio bonas ? – interesiĝas tiu. Mi ekstremis. Ĉu vere min aŭto surveturis! Ĉu eble mi de sur tegmento falis? Mi eĉ scias, kion necesas respondi.

– Mi sentas min bonege.

Se min surveturis la aŭto, tamen ne hodiaŭ, sed antaŭ dek jaroj aŭ pli, – proksimume tiomlonge mi tuta doloras.

– Ĉu vi scias, kie vi troviĝas? – ne forlasas min tiu.

– En Eŭropo, sed nome en kiu lando mi ne perceptas... Ĉie estas tiaj samaj reklamoj, la aŭtoj, ĉie esperantistoj. Libereco por migrado, – agrable... Tiu ulo rigardas min tiel scivoleme. Kiu diris, ke ni, esperantistoj, ne estas interesaj al la homoj?

– Ĉu vi aŭdis, kiuj regas la mondon? – demandas mi. – Ĉu araboj? Aŭ rusoj?

Ŝajne tiun ulon miaj vortoj ne impresis... Mi

ekstaris, faris paŝon antaŭen kaj atakis: – „Ĉu vi scipovas Esperanton?“

– Kion vi volas ? – retiriĝis tiu.

– Ĉu vi scias, kio okazas nun tie, en Esperantujo? – daŭrigas mi.

– Kion tio signifas? – denove tiu.

– Signifas! Ne signifas! Kiel ci tedis al mi! – koleras mi. – Vi montru al mi vian nacian specifecon!...

Tiu gestadas per manoj. Mi montras al li kombinaĵon de tri fingroj.

– Ĉu vi scias, kio estas tio?

Li diras nenion, tamen mi sentas, ke li scias. Komprenoble, mi tuj perceptis, ke li estas kontraŭulo de Esperanto kaj mi kondukis adekvate al tio: mi demonstris bonan lingvostilon, kaj eĉ stilon plus... Kaj ĉion mi finis per multetaĝaj blasfemaĵoj.

– Forrr! – fine ekkriis mi. Kaj en tiu krio oni povis ekaŭdi la eĥon de gloraj pasintaj universalaj kongresoj, koŝmaron de la nuntempo kaj esperon de la pli bona tempo.

-- de **Laimundas Abromas** el Litovio

## Dua premio pri Humuro en EKRA 2021

### La Reĝo de Koregonoj

### tradukis kaj sendis **Andreo R. Pacholski** el Pollando

*Mi sendas por Turka Stelo mian tradukon de la loka legendo de Mikołajki (Pollando), kie mi loĝas, pri la Reĝo de Koregonoj. La polan tekston de la legendo mi prenis el la retejo :*

<https://mikalajki.eu/miasto/legenda>

**Andreo R. Pacholski**

**L**a turbulan historion de la urbo Mikołajki rememorigas legendo el la 16-a jarcento, kiu estis transdonata de generacio al generacio:



Iam la akvojn de la mazuriaj lagoj regis la Reĝo de Koregonoj - grandega fiŝo kun ora krono sur la kapo, la plej forta kaj plej inteligenta el ĉiuj akvaj estaĵoj. Kiam komenciĝis la alfluado de setlantoj al ĉi tiuj terenoj, grandaj fiŝkaptistaj boatoj svarmis sur la lagoj, kaj per la retoj oni tiris grandegajn kvantojn da fiŝoj el la akvo. Kaj tiam la prusaj dioj vokis al si la

Reĝon de Koregonoj kaj ordonis al li ĉesigi la nesatigeblan avidecon de la homoj. La Reĝo eliris al la lagoj kaj komencis militon kontraŭ la fiŝistoj. Li renversadis boatojn, disŝiradis retojn, ĝis la timigitaj fiŝkaptistoj ĉesis fiŝkaptadi. Malsatkrizo ekaperis en iliaj hejmoj, kaj multaj fiŝkaptistoj iris serĉi okupon, al lokoj, kiujn la potenco de la koregona reĝo ne atingis. Tiam la edzino de unu el ili ekmemoris pri malnova, prusa kutimo fari oferojn por trankviligi la diojn. Kiam ŝi faris oferon dum malhela, nuba nokto en la profundo de la arbaro, la nuboj disiĝis por momento kaj lunlumo falis sur la oferŝtonon, kie ekbrillis malgranda, fera ringo. La virino prenis ĝin tuj, portis ĝin hejmen kaj donis ĝin al sia edzo. Ŝia edzo, kiu ankaŭ forĝadis krom fiŝkaptadi, tuj eklaboris. Dum semajnoj li kaŝe forĝis en sia forĝejo grandegan reton el feraj ringoj.

Kiam li finis sian laboron, li eliris kun siaj filoj al la lago kaj ĵetis la reton. Post kelkaj momentoj la akvo ekondis, blankaj ŝaŭmaj ŝprucoj leviĝis ĉirkaŭe – grandega, arĝenta fiŝo kun krono sur la kapo baraktis en la reto. Per homa voĉo ĝi petis la fiŝkaptiston ŝparsi sian vivon, kaj rekompence ĝi promesis, ke la retoj pleniĝus per fiŝoj kiel neniam antaŭe. La fiŝkaptisto allaĉis la reton kun la Reĝo de Koregonoj sur sablobenko kaj ekiris por fiŝkapti plu. La reto estis efektive plena, do la lerta fiŝkaptisto venis al Mikołajki





kaj vendis la tutan kaptajon, ricevante arĝentan moneron kontraŭ ĉiu fiŝo. La sekvan tagon li faris same. Vespere, gaja, kun sako plena de moneroj, li iris

al la loka gastejo, kie lia lango loziĝis pro biero kaj li malkaŝis sian sekreton...

La sekvan tagon, tuj kiam la suno leviĝis super la lago, ĉiuj boatoj de Mikołajki veturis al Śniardwy, la plej granda lago. Tie la fiŝkaptistoj trovis sablobenkon kun la Reĝo de Koregonoj sur ĝi. Ili altiris lin al Mikołajki kaj komencis cerbumi, kion fari kun la predo. Tiam la Reĝo ekparolis denove per homa voĉo, petante ilin ŝpari sian vivon kaj promesante por ĉiam abundajn kaptajojn en sia regno. Interkonsiliĝinte, la fiŝkaptistoj decidis ŝpari la vivon de la Sinjoro de Mazuriaj Lagoj, sed por povi superrigardi lin, ili fiksis lin per fera ĉeno al la piliero de la ponto.

tradukis kaj sendis **Andreo R. Pacholski**  
el Pollando

## Kiel mi lernis mortigi homojn

**E**n Nederlando en la komenco de la antaŭa jarcento estis krimo se viro ne estis en la armeo en kazo de milito; la puno estis morto. Do ĉe la komenco de la Unua Mondmilito, en 1910, la nederlanda registaro ordonis, ke ĉiuj junaj viroj devis anonci sin ĉe la armeo por registriĝi por milita servado. Mia patro, kiu estis pacifisto, sciigis al la instancoj ke li ne enregistros sin ĉar li ne rajtas mortigi homojn. Do la armeo iris al lia loĝejo, kaptis lin, kaj prenis lin al la armeaj kazernoj, kie ili metis lin en malliberulejon. Sed oni ne mortigus lin antaŭ ol Nederlando deklarus militon, al Germanujo kiu jam militis en Francujo. Sed ĝi decidis ne invadi Nederlandon kaj ne militi kontraŭ mia lando. Do Nederlando ne bezonis deklari militon, kaj restis neŭtrala dum la unua mondmilito. Konsekvence la armeo ne mortigis mian patron (tial li poste povis esti mia patro!) kaj liberigis lin baldaŭ. Li intertempe spertis iomete la brutecon de la armeaj kapitanoj, sed ne persone. Dum la milito Nederlando fartis bone, dum Germanujo batalis dum kvar jaroj en Belgujo kaj Francujo. Mi naskiĝis en la fino de la milito, en la jaro kiam mortis Zamenhof.

Kiam mi havis la aĝon de 17, ankaŭ mi devis eniri en la armeon, ne por tuj militi, sed por lerni, kiel "rekruto", la arton de militi. Nur post tio oni povas esti

## de Marcel Leereveld el Aŭstralio

soldato. Kaj en tiu tempo ĉiuj estontaj rekrutoj ricevis poŝtan inviton al intervjuo por decidi en kiu parto de la armeo oni deziris servi. Mi do iris al la intervjuo, kaj diris al la armeisto ke mi deziras servi tiom malfrue kiom eblas, kaj ke mi deziras servi tiom mallonge kiom eblas. La armeisto bonvole faris ĉion kion mi petis, kaj metis min por kvin monatoj en la artilerio kiel signaliston (en la signalroto de la plotono), la plej malforta laboro. Tiel mi devis lerni la morsosimbolaron kaj kiel konstrui telefonliniojn de unu loko al alia. Ankaŭ kiel uzi tiujn telefonojn. Ni do ofte laboris ekstere, sed ne kiam pluvis. La lernado kaj praktikado daŭris kvin monatojn, la longecon de mia rekrutado. Sed ĉar ni estis parto de la artilerio, kiu uzis tiutempe (1933) tre pezajn kanonojn tiratajn de ĉevaloj, ni devis matene kaj vespere prizorgi la ĉevalojn, t.e. purigi ilin kaj manĝigi ilin. Mi ŝatis tiun laboron ĉar mi ŝatas animalojn. Sed mi timis unu el la ĉevaloj, kiu ĉiam penis mortigi la lin servantan rekruton, kaj jam sukcesis mortigi unu soldaton. Sed la serĝento elektis kiun ĉevalon purigi. Estis sufiĉe facila por ĉevalo piedfrapi aŭ kapfrapi la soldatojn, ĉar ni devis fleksiĝi por purigi la piedojn. Kelkfoje ni devis prizorgi malsanajn ĉevalojn, en la malsanejo. La armeaj rajdistoj de la ĉevaloj ne purigis la ĉevalojn: ili nur praktikis rajdi la bestojn tirantajn la pezajn kanonojn. Cetere dum la posta milito tiuj kanonoj montriĝis senutilaj. En la milito ni estis devontaj fari la saman laboron kian en la rekruteco. La artilerio kaj la kavalerio estis la solaj partoj de la armeo kiuj ricevis matenmanĝon de firma supo. En ĝin oni metis ĉiujn partojn de la animalaj korpaj, sed ni ne rekonis ilin. Tamen unu en nia plotono, kiu estis profesia buĉisto,





jam trovis penisojn kaj bovinajn uterojn, kaj tial ne plu manĝis la supon, sen diri al ni kial. Cetere li laboris kiel kuiristo en la armea kuirejo, kaj tiel povis manĝi la pli bonan manĝon por la kapitanoj. Tamen mi ne komprenas, kial penisoj kaj uteroj ne povas same bonguste manĝati kiel renoj kaj hepatoj de la bestaj korpoj.

Mi ne ŝatis resti en la kazerno dum la senlabora semajnfino. Tial mi ĉiun semajnfino iris hejmen, eĉ kiam mi estis sur la listo por deĵori, ĉar mi ĉiam sukcesis trovi iun kiu kontraŭ pago transprenis mian deĵoron. Preskaŭ ĉiuj rekrutoj en la artilerio loĝis en la kamparo kaj estis farmistoj, kaj restis semajnfine en la kazerno, anstataŭ sufiĉe longe vojaĝi. Ĉiusemajne mi kolektis, kaj ankaŭ forprenis el de la kuiristo, panojn por preni ilin hejmen, ĉar miaj gepatroj estis senlaboraj kaj ĝuis la ekstran manĝaĵon. Mi povis fari tion ĉar mi ĉiumatene manĝis anstataŭ pano la dikan supon. Unu fojon la kuiristo estis tre kolera ĉar lia pano estis malnova kaj malmola, kaj li ne sciis pro kiu. Unu malagrablo estis, ke ni havis niajn pafekzercojn en la sabataj matenoj, kaj mi dum ĉiu semajnfino estis surda. Kaj mi ja hejme deziris aŭdadi gramafondiskojn de operokantistoj.

Dum la teoria kaj praktika lernado mi en la plotono estis ĉiam la plej bona, kaj ankaŭ en la pafado. Tial mi estus povinta en posta milito sukcese mortpafi multajn soldatojn de la alia flanko de la batalolimo. Sed bedaŭrinde por la armeo mi forlasis ĝin antaŭ la dua mondmilito. Sed pro miaj sukcesoj kiel rekruto mi timis ke oni farus min korporalo, kio signifus tutan jaron da rekrutado. Do mi decidis ke mi devos malsukcesi en la finaj ekzamenoj de la rekruteco. La kapitano de la plotono ĉeestis la praktikan parton. Kaj mi sukcesis malsukcesi en ĉiuj partoj. Sed la kapitano ne estis kontenta pri tio, kaj la serĝento devis aranĝi ripeton de la ekzameno por la tuta plotono, nur por ke mi povu sukcesi. Sed ankaŭ tion mi sukcesis malsukcesi, kvankam ĉiu sciis ke mi estis la plej bona lernanto. Do la kapitano decidis refoje organizi la ekzamenon, sed nur por mi. Tamen refoje mi sukcesis malsukcesi, malgraŭ iom da timo. Do tio estis la fino de mia "rezisto", kaj mi ricevis malbonan raporton ĉe la fino de

la rekruteco. Sed je la adiaŭo la serĝento konfidis al mi, ke la kapitano volis ĵeti min en la malliberulejon pro mia "kaŝa rezisto" nepruvebla. Sed la serĝento persvadis lin ne enkarcerigi min. Kaj li aldonis ke mia timo korporaligati estis senutila ĉar tio ne okazus. Krome mi tamen restis uzebla por

soldatiĝi poste.

Tiu soldatiĝo okazis plurajn jarojn poste, en 1939, pro la komenco de la Dua Mondmilito. Mi, kiel ĉiuj aliaj soldatebluloj, ricevis leteron anonci min al la armeo. Sed anstataŭ iri, mi retro sendis leteron dirante ke ili povas iri al la diablo kaj ke mi ne eniros en la mortigeman armeon. Tamen je la tago kiam mi forsendis la leteron, unu el la subdirektoroj de la banko en kiu mi tiam dungite laboris, kaj kiu subdirektoro estis kapitano en la armeo, persvadis min ne sendi la leteron kaj telefonis la ĉefoficejon de la amsterdama poŝtoŝeficejo por serĉi kaj resendi la leteron. Post tio li verkis afablan leteron al la armeo kiun mi devis sendi. Li faris ĉi ĉion por helpi min ne esti enkarcerigota. Mi tamen devis iri por soldatiĝi. En la kazerno iu serĝento havis la taskon bonvenigi min. Li sidigis min por serĉi pliajn ordonojn kion fari pri mi. Sed li forrestis pli ol horon, kaj mi pensis ke oni forgesis pri mi. Do mi foriris kaj iris hejmen. La proksiman tagon mi rekomencis labori en la banko. Mi multe poste aŭdis, ke oni serĉis min, povis nenie trovi min, kaj kulpigis la serĝenton pri tiu mia "elsaviĝo", kiu simple ne okazis ĉar mi nur pensis ke oni forgesis pri mi, post pli ol horo da atendado. Intertempe mi estis hejme kaj dumtage laboris en la banko. Fine ili trovis min hejme, kaj tuj kondukis min al la kazerno. Intertempe mi ricevis el de mia kuracisto dokumenteton dirantan ke mi, pro stomakulcero, devis havi striktan dieton. Mi tuj montris tion en la kazerno, kiu decidis ke ili ne povis doni al mi tiun dieton, kaj sendis min al katolika malsanejo kiu nun laboris por la armeo. Mi restis tie, en lito, dum monato, ĝuante la flegistinojn kaj la manĝojn dietajn, kaj ricevis nur kelkajn vizitojn de kuracistoj. Mia najbaro, ankaŭ soldato, ripozis tie por farita operacio sur lia mano. Lia stomako ne estis malsana, sed la flegistinoj tamen donis al li malmulte da manĝaĵo, tiel ke li daŭre malsatis. Unufoje semajne miaj gepatroj vizitis min, kaj sekrete alportis al la najbaro ekstran manĝaĵon. Sed ial la katolikaj flegistinoj rifuzis doni al li sufiĉe da manĝo. Cetere li estis katolika. Post monato la armeo liberigis min kun atesto ke mi ne povas militservi pro "korpa manko". Mia nura manko estis, ke

>>10



Kino: Ambaŭ venenbotelo kaj sfero de lumo de amo.

\*\*\*

Kino: Cerba malliberejo.

\*\*\*

Kino: Metilernanto de literaturo.

\*\*\*

Spektanto: Konsumanto de imagoj.

\*\*\*

Spektanto: Virtuala aventuristo en la komforto de la

## Fernando Maia pretas plu gvidi UEA-n

**Vicprezidanto Fernando Maia pretas daŭrigi en la estraro de UEA, dum prezidanto Duncan Charters ŝajne ne rekandidatos por nova mandatperiodo. Tiu estis la ĉefa novaĵo de la tradicia programero La estraro respondas dum la daŭranta Virtuala Kongreso de UEA.**

Ĝis 80 kongresanoj sekvis samtempe la programeron La estraro respondas dum la Virtuala Kongreso en vendredo la 23-a de julio 2021. Ĉeestis ĉiuj estraranoj, krom Jérémie Sabiyumva, kies neĉeesto ne estis aparte klarigita: eventuale temis pri problemoj kun reta konekto. La kvanto de spektantoj estis komence sub 30, sed kreskis ĝis la fino al maksimumo de 80 samtempe.

Multaj demandoj temis pri la nuna stato kaj estonteco de UEA. La antaŭa strategia plano de UEA estis aprobita en Rejkjaviko la 26-an de julio 2013 kaj validis dum la periodo 2013-2017. Nova plano daŭre mankas, sed laŭ prezidanto Duncan Charters jam komenciĝis preparado.

Jam okazis kunsidoj kun komitatanoj pri tio kaj kolektiĝis "amaso de bonegaj ideoj". Nun necesas nur organizi ilin, Charters klarigis. Fine de 2021 li esperas prezenti malneton.

La nova retejo, kiun oni preparas jam de ok jaroj, laŭ la estraro nun praktike pretas, kaj la testado komenciĝis.

Tamen la provoj montris kelkajn cimojn, kiuj devis esti korektitaj. Oni esperas, ke oficistoj de UEA baldaŭ povos testi la novan sistemon, kiu, krom la retejon



brakseĝo.

\*\*\*

Spektanto: Okulumisto de timo, perforto, sekso.

**Konuralp Sunal**

Büyükkada, Turkio

La 26-a de julio 2021

## -- el Libera Folio

mem, ampleksos administrajn funkciojn. Nur poste la retejo estos malfermita al ĉiuj.

Pli frue dum la jaroj diversaj prezidantoj kaj estraranoj menciis diversajn datojn por la lanĉo de la retejo, sed ĉiuj venis kaj pasis sen apero de retejo, kaj nun la estraro jam ne volis menciigi ajnan limdaton por la efektiva lanĉo.

Tra la jaroj ŝanĝiĝis la teamoj, kiuj okupiĝis pri ĝi, ne laste pro disputoj inter si kaj kun la estraro.

La ekonomia stato de UEA nun estas bona, laŭ Huang Yinbao (Trezoro), estrarano pri financoj:

– Laŭ mi la nuna ekonomia situacio iras en bona vojo. Unuflanke la kosto malmultiĝas kaj la enspezo altiĝas. Kaj estontece eble ni daŭre iros laŭ tiu vojo. La ĉefa enspezo laŭ mi daŭre estas la membra kotizo kaj donacoj. Ankaŭ ni pene serĉos eksteran subvencion.

Vicprezidanto Maia menciis la pasintjaran subvencion de la nederlanda ŝtato kiel unu ekzemplon. Tiu subvencio tamen estis specife celita por kovri perdojn kaŭzitaĵajn de la pandemio, do apenaŭ oni povos esperi pri similaj subvencioj en aliaj jaroj. Maia ankaŭ rakontis, ke UEA kontaktis la entreprenon Kosmo por kunlaboro por havigi subvenciojn de Eŭropa Unio.

– Ankaŭ kun aliaj partneroj ni faras tion, ne nur kun Kosmo. Tiu enspezfonto tamen ne estas certa, ĉar oni ne povas garantii ke ni ricevos subvenciojn. Tial ankaŭ kotizoj kaj donacoj estas gravaj.

Maia aparte menciis la kampanjon Alianco 365, kiu estas plano por konstanta monata donacado al UEA. Laŭ tiu plano donacantoj pretas donaci po 31 eŭrojn monate al la Asocio.

– Tiujn, al kiuj eblas, mi urĝas tion fari. Tia donacado donas bazon por nia laboro.

**Fernando Maia kaj Amri Wandel pretas kandidati por la sekva estraro**, kiu estos elektita venontjare dum la Universala Kongreso en Montrealo, dum prezidanto Duncan Charters ne ŝajnis entuziasma pri plia mandatperiodo:

– Mi kredas ke Fernando absolute havas la vicon por kandidati por prezidanteco, ĉar lastfoje li havis fortan subtenon. Do mi absolute ne pledas por rekandidatiĝo kiel prezidanto. Ne nur Fernando sed ankaŭ aliaj estas preparitaj por transpreni la taskon kaj estas bone havi novan sangofluon, Charters diris.

Fernando Maia estas vicprezidanto de UEA, sed dum la lastaj jaroj li estas multe pli videbla en la gvidado de la asocio ol prezidanto Charters. Maia ne diris, por kiu posteno li kandidatos, sed alia klara kandidato por la prezidanteco momente mankas, se Charters ne daŭrigos, kiel li aludis.

– Mi pretas resti kiel estrarano de UEA, ne nepre kiel prezidanto aŭ vicprezidanto, sed mi pretas plu labori por la asocio kaj tre verŝajne kandidatos, sed ne scias por kiu posteno, Maia diris.

**Kiel "kondiĉon" por sia pluresto en la estraro Maia indikis**, ke Alex Kadar restu kiel ĝenerala sekretario. Poste oni multe laŭdis la laboron de Kadar kaj diris, ke estus malfacile imagi la laboron de la estraro sen li. Kadar tamen atentigis, ke lia mandatperiodo kiel komitatano B finiĝos, kaj ke li povos daŭrigi kiel estrarano nur se li estos reelektita kiel komitatano.

Fernando Maia siaflanke ne bezonos aprobon de la individuaj membroj de UEA por resti en la komitato, ĉar li estas komitatano A, elektita de Brazilo Esperanto-Ligo, kaj restos komitatano A ankaŭ en la sekva oficperiodo – pri tio li jam interkonsentis kun BEL.

La estraranoj Trezoro Huang Yinbao kaj So Jinsu nenion diris pri siaj planoj por la sekva mandatperiodo. Prezidanto Duncan Charters atentigis, ke virinoj nun mankas el la estraro kaj kuraĝigis virinojn kandidatiĝi. "En la komitato estas talentaj virinoj", li diris.

**La delegita reto** kaj ĉu iuj ĝin nuntempe uzas estis la temo de unu el la demandoj. La estraro asertis, ke la delegita reto reformiĝos post la renovigo de la retejo, kies dato tamen restas nekonata.

En 2018 la komitato sen diskuto aprobis la proponon de la estraro forigi la Jarlibron por ŝpari monon. Tiam oni asertis, ke la Jarlibron anstataŭos ĝuste la nova retejo, kaj krome "almanako", kiun oni povus publikigi ĉiun trian jaron en papera formo kaj

kontraŭ pago sendi al dezirantoj.

Tamen nek retejo nek almanako aperis. Duncan Charters diris ke oni ja esploris pri la ideo de almanako, sed mankas decido pri la afero. Laŭ Orlando Raola montriĝis, ke estas tro koste produkti Jarlibron kaj mankas laborforto por tio en la Centra Oficejo.

**Ĉu eblas pagi al UEA per bitmono**, demandis iu el la ĉeestantoj. La respondo ne estis tute klara. UEA ankoraŭ ne uzas bitmonon, kaj eble estas bezonata longa tempo antaŭ ol tio povos okazi, interalie ĉar necesas bone informiĝi pri la reguloj en Nederlando, diris estrarano Trezoro Huang Yinbao.

Sed se tamen iu volas pagi per bitmono, Fernando Maia petis la koncernan personon kontakti UEA-n.

– Ni diskutas tion nun kun la ĝenerala direktoro Martin Schäffer, ni devas kelkajn aspektojn ankoraŭ esplori. Ankaŭ Facebook proponos peradon de pagoj, kaj tio verŝajne estos bona afero por afrikanoj, kiuj povas kvazaŭ senpage aliri ĝin. Se iu vere volas pagi per bitmono, tiu skribu al la estraro aŭ la ĝenerala direktoro. Ni analizos la aferon kaj tio donos al ni materialon ankaŭ por kompreni kiel procedi, Maia diris.

Universala Kongreso en Afriko estas multjara revo de UEA kaj nun aperis serioza kandidatiĝo de la landa asocio en Tanzanio. La afero ne estas ankoraŭ decidita.

Laŭ Orlando Raola, kiu respondecas pri kongresoj, ja eblas organizi kongreson en Afriko en iu luksa hotelo, sed tio signifus, ke granda parto de la afrikanoj mem tiam ne povus partopreni. Necesas trovi solvon, kiu ebligas ankaŭ al afrikanoj partopreni, li klarigis. Finance kongreso en Afriko estas certe malfavora por UEA.

**La demandoj pri eventuala malpliigo de flugoj** al kongresoj kaj ankaŭ pri eventuala kongreso en Afriko fokusiĝis plejparte al ekonomiaj sekvoj al UEA.

Orlando Raola respondis al Ulla Luin, ke la kongreso en Montrealo celas esti plej ekologie konscia kaj estas planata kampanjo por kolekti monon por planti arbojn, kiuj kompensos la karbonan dioksidon produktotan pro la venontjara kongreso.

Amri Wandel atentigis, ke UEA jam ŝparis multe da karbona oksido ĉar okazis du virtualaj kongresoj, kaj ankaŭ estonte grandan parton el la kongresaj programeroj eblos sekvi virtuale eĉ se okazos ĉeesta kongreso. Krome, la IKU-libro aperis virtuale, li menciis.

Apud la ekologiaj problemoj kiujn kaŭzas la flugoj kaj vojaĝado, ankaŭ ŝparado de paperaĵoj senditaj al

Globobs estas eksperimenta projekto, kiu celas traduki al esperanto kaj oferti en unu loko ĉiujn lokajn kaj internaciajn novaĵojn en la mondo. Globobs uzas artefaritan inteligentecon por oferti pli ol 600 artikolojn ĉiutage tradukitajn al Esperanto el 250 amaskomunikiloj en pli ol 100 landoj.

**Ĉe Globobs, novaĵoj en Esperanto estas traktataj laŭ 4 anguloj:**

**INTERNACIAJ NOVAĴOJ:** Proponu al vi aliron en Esperanto al diversaj amaskomunikiloj tra la mondo kaj donu al vi komprenon el diversaj vidpunktoj pri la internacia situacio

**LOKAJ AKTUALAĴOJ:** Permesu al vi sekvi lokajn novaĵojn en Esperanto traktitajn de lokaj amaskomunikiloj en iu ajn lando

**OPINIOJ:** Malkovru novajn opiniojn per legado de debatoj kaj kolumnoj esperantigitaj pri varmaj temoj en unu el la 100 traktataj landoj

**KULTUROKAJ VIVMANIERO:** Estu scivolema kaj malkovru tendencojn de la tuta mondo danke al la sekcioj Kulturo kaj Vivstilo: Artoj, Muziko, Modo, Literaturo, Gastronomio, Libertempo

### 2 Manieroj Subteni Globobs:

**FARIĜI TESTISTO:** Maŝina tradukado havas la avantaĝon produkti grandan kompreneblan volumon de gazetaraj artikoloj en lingvoj tiel diversaj kiel rusa, svahila, korea. Tamen por gvidi la artefaritan inteligentecon de niaj sistemoj, ni devas certigi, ke la artikoloj estas ĝuste formulitaj laŭ la reguloj de Esperanto. Ĉu vi havas bonan nivelon en Esperanto kaj volas partopreni nian projekton? Fariĝu testisto, partoprenu en bonega homa aventuro kaj antaŭ ĉio ĝuu legi Globobs senpage dum unu jaro!

**ABONI:** Por la lanĉo, la artikoloj pri Globobs restas haveblaj senpage konsulti. Por disvolvi Globobs, ni intencas prioritigi la subtenon de niaj legantoj super tiu de reklamantoj. Ni volas proponi al vi komfortan kaj sen reklaman legadspacon, do ni esperas kalkuli vin inter niaj abonantoj.

### Kiu estas malantaŭ Globobs ?

**Hocine REGUIDA**, 45-jaraĝa, mi loĝas en la sudoriento de Francio. Mia kariero estas dividita inter IT kaj la humanitara sektoro. Ekde la komenco de 2021 mi laboras pri ĉi tiu ambicia projekto, ideala okazo, kiu kondukis min eklerni Esperanton.

### Kial Globobs ?

La misio de Globobs estas antaŭenigi interkulturecon kaj malfermitecon de iliaj legantoj donante al ili al nefiltritajn informojn por helpi ilin pli bone kompreni la mondon en kiu ni vivas.

**GLOBOS**

### Defioj de Globobs

Kreante Globobs, mi aspiras oferti sendependan retejon, kie la libereco de ĉiuj opinioj estos respektata. Kun iom pli ol 100 landoj kovritaj kaj preskaŭ 300 amaskomunikiloj ĉe la lanĉo, la celo de Globobs estas kovri ĉiujn sentemojn en ĉiuj landoj kaj tiel doni al la leganto la ŝancon vidi la mondon alimaniere. La celo estas ambicia, sed ni kredas je ĝi. Mi ankaŭ aspiras certigi striktan politikon pri protektado de datumoj, evitante dividi viajn datumojn kun publikaj kaj privataj aktoroj. Tial mi elektis apriorie ne fidi je reklamaj enspezoj por financi Globobs. Pro ĉiuj ĉi tiuj kialoj, post la lanĉa periodo, ni ofertos al vi justan abonsistemon. La defioj estas multaj: plibonigi la maŝintradukan sistemon, disvolvi funkciojn, permesante eĉ pli efikan aliron al ĉiuj ĉi tiuj fontoj, validigi daŭrajn kaj justajn partnerecojn kun ĉiuj amaskomunikiloj, ktp. Globobs devas do baziĝi sur ekonomia modelo farebla por atingi ĉi tiujn celojn. Do mi fidus vian subtenon.

Dankon,  
**Hocine REGUIDA**  
Fondinto de Globobs

The screenshot shows the Globobs website interface. At the top, there is a navigation bar with the logo 'GLOBOS' and several menu items: 'LOKAJ NOVAĴOJ TRA LA MONDO', 'PERSPEKTIVO PRI LA MONDO', 'OPINIOJ KAJ DEBATOJ', 'KULTURO', and 'VIVMANIERO'. Below the navigation bar is a large featured article with a red and white background, titled 'Vakcinitaj turistoj ne rajtos eniri Kanadon dum "momento" (Belga fonto)'. Below this article is a section titled 'INTERNACIAJ NOVAĴOJ' which contains a grid of smaller news items. The first item is a map showing a 5.9 magnitude earthquake in California-Nevada. The second item is a photo of soldiers in Turkmenistan. The third item is a photo of a man, identified as the former president of South Africa. Below the grid are three more image thumbnails.

## La Granda Muro de Ĉinio

"La Granda Muro" estas ĝia oficiala nomo. Ĉinoj kutime nomas ĝin "la Longa Muro". Ĉar la longeco estas miloj da lioj, oni ankaŭ nomas ĝin "la dek-mil-lia Longa Muro". La efektiva longeco de la Granda Muro estas pli ol dudek mil kilometroj.



La konstruado de la Granda Muro komenciĝis en la 5-a jarcento a.K.E., dum la periodo de Militantaj Regnoj. Tiam ne ekzistis unu longa muro, sed pluraj muroj malpli longaj. En la 3-a jarcento a.K.E., Qin Ŝi Huang sukcese venkis la aliajn regnojn kaj fariĝis la unua imperiestro de la unuigita Ĉinio. Li komencis la konstru-laboron, kiu longigis la ekzistantajn murojn kaj kunigis ilin. La generalo Meng Tian uzis tricent mil soldatojn por fari la taskon, ĝis finfine formiĝis unu longa kontinua murego.

Postaj dinastioj daŭre faris la konservan aŭ konstruan laboron. Precipe dum la Ming-dinastio, de la 14-a jarcento ĝis la 17-a jarcento, la Granda Muro dudek fojojn estis riparita. Ĉiufoje la riparado postulis la laboradon de kelkcent miloj da soldatoj aŭ kamparanoj. Tio estis grandega tasko.

La Granda Muro serpentumas ĉirkaŭ la montaroj Yinshan (陰山) kaj Yanshan (燕山), kiuj etendiĝas tra norda Ĉinio de la okcidento ĝis la oriento. Ĝi ĉefe protektis la ebenaĵon kaj la urbojn de centra Ĉinio kontraŭ la nordaj nomadaj triboj. Oni ofte diras, ke la Granda Muro estas videbla de la Luno. Tio estas dubinda, ĉar ĝia larĝeco estas pli-malpli 6 metroj, tiel ke multaj aŭtovojoj estas pli larĝaj ol ĝi. Tamen, pro ĝiaj longeco kaj aparteco la Granda Muro estas la plej granda militkonstruaĵo iam ajn konstruita. Tial ĝi apartenas al la Monda Heredaĵo de Unesko ekde 1987.

Nuntempe oni per diversaj manieroj povas viziti tiun grandan muregon en 15 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio. La plej fama kaj facile atingebla loko por vidi la muregon estas Badaling, 85 kilometrojn norde de Pekino. Ĉiutage kelkaj dekmiloj da turistoj vizitas ĝin.

Multaj ĉinaj literaturaj verkoj rilatas al la Granda Muro. Ĝi profunde influis la ĉinan kulturon.

Liru Chen \*

\* **Liru Chen** estas ĉina esperantistino, kiu loĝas en Pintung, en la sudo de Tajvano. Ŝi per Esperanto vojaĝis al Universalaj Kongresoj kaj aliaj kongresoj, kaj vizitis Koreujon, Japanujon, Vjetnamujon kaj kelkajn eŭropajn landojn.

### NOVAJ VORTOJ

**a.K.E.:** antaŭ Komuna Erao (= antaŭ la jaro nulo laŭ la internacie uzata sistemo).

**aŭtonoma:** reganta sin mem; memstare decidanta pri kelkaj politikaj aferoj.

**dinastio:** sinsekvo de regantoj el la sama familio.

**ebenaĵo:** vasta ebena regiono.

**etendiĝi:** malvolviĝi laŭ la longo; okupi vastan spacon aŭ tempon.

**generalo:** plej grava estro de soldatoj, kiu planas iliajn agadojn.

**heredaĵo:** tio, kion la nuntempaj homoj trans-donas al la homoj, kiuj vivas en la estonteco.

**imperiestro:** reĝo de grandega ŝtato, kiu konsistas el pluraj venkitaj landoj sub la reĝo de unu pli forta lando.

**influi:** havi efikon sur la pensoj kaj agoj de alia(j) homo(j).

**kontinua:** sen-interrompa.

**lio (里, li):** ĉina mezurunuo de longeco, egala al duona kilometro.

**nomado:** membro de grupo, kiu ne loĝas fikse en la sama loko, sed vojaĝas ĉiam de loko al loko, ofte laŭ la sezonoj aŭ laŭ la havebleco de manĝaĝoj por si mem kaj siaj bestoj.

**oficiala:** laŭregule akceptita de iu grava persono aŭ oficejo, kiu havas la rajton decidi pri tiu afero.



### Solvo de la krukvortenigmo

N	O	D	V	T	P		O	N	I	D	O
O	T	U	K	O		O	R	O	T	V	A
N	V	P	O		O	R	T	E	P		E
O	V	V		O	R	B	I	T		O	J
D	O		O	N	V	I	T		O	N	V
N		O	N	E	I	V		O	T	E	R
O	Ĉ	N	V	R	T		O	K	V	T	V
T	E	I	V		I	T	O	B	V	A	S

>>20

## Estas bone vojaĝi en Ĉeĥio fervoje

J. Drahotová

Simpatia rimarko por niaj eksterlandanoj estas klarigoj en Esperanto en la dika horarlibro (eble ne ĉiujare...). Sed se vi estas esperantisto kaj vi ne kaŝas tion (portante signon), aŭ vi simple estas konata esperantisto, vi povas sperti ion similan, kiel mi.

Post aĉeto de trajnbileto mi mispoŝigis la trajnbileton kun rabatilo por pensiuloj, kiuj falis planken. Jam sidante, trankvile atendente la forveturon en la vagono mi nenion sciis pri tio. Bona feino alhastis kaj kun feliĉa bela rideto donis al mi mian perdaĵon du minutoj antaŭ ol la trajno moviĝis...

Eĉ se vi estas nekaŝita esperantisto, vi povas trovi homojn, kiuj alparolas vin kaj vi povas babili... agrable pasi la tempon.

Tamen hodiaŭ mi spertis ĝentilecon de fervojkontrolisto, spite li ne estis probable esperantisto (?).

Estis la unua tago post la valideco de mia rabatilo. Tiun fakton mi ne rimarkis - mi, blankharulino, kun okulvitroj, avino kun dorsosako... Sed kontrolisto estis afabla kaj postulis nur malaltan monpunon kaj pagon ĝis plena bileto. Junulo, sidanta kontraŭ mi lerte proponis al li, kiam kontrolisto vane serĉis inter sia mono por redoni la sumon je mia ununura milkrona bankbileto, ke li povas ŝanĝi al li monon kiel li bezonas kaj ridis al mi. Li havis surprize okuloj kun malsama koloro...

Kontrolisto ankoraŭ konsilis al mi kiel senprobleme aĉeti rabatilon antaŭ revojaĝo. Kaj aŭdante ke mi revenas post unu tago, li elmetis el poŝo tondileton kaj liberigis mian foton de rabatilo sendifekte, ĉar ĉiam oni devas doni foton dum aĉeto de nova rabatilo.

Hodiaŭ eĉ kun ĝojo mi rememoras lin. Li havis malaltan staturon, kiel mi. Ankaŭ mi ŝatas trakti kun ĝentilaj homoj „vizaĝ´ al vizaĝo“ – demokrate...

Ĉe la elvagoniĝo li helpis min de la alta ŝtupo.

Dum la alia tago mi denove vojaĝis de Mladá Boleslav al Prago trajne. Mi envagoniĝis en kupeon, kie jam sidis patrino kun knabineto eble kvinjara. La knabino havis infanan libron kaj kun granda entuziasmo ŝi laŭte „legis“. En la libro ja estis kelkaj

literoj, eĉ vortoj, sed precipe bildetoj de objektoj, bestetoj kaj figuretoj vicigitaj en frazojn. La knabineto senerare legis kaj daŭrigis la legon al pli kaj pli komplikaj taskoj. La patrino povis nur laŭdi ŝin.

Venis ĉapitro kun leciono kiun ni povas en esperanto nomi finaĵo –et-. Pri tiu „malgrandigo“ en la ĉeĥa lingvo abundas vortoj, kompare kun la germana kaj angla. La knabino faris tion trankvile: pták – ptáček (birdo-birdeto), oblak – obláček (nubo-nubeto), prst – prstíček (fingro-fingreto), kůl – kulíček (fosto...), la patrino malsereniĝis, sed diris nenion. La knabino daŭrigis la legadon: lev – levíček (leono ...). La patrino diris: „Tien oni ne parolas, oni diras lvíček!“

La knabino demandis: „Kaj kial?“ La patrino: „Tial!“ La knabino: „Sed kial?“ La patrino: „Ĉar tial, ĉesu demandi!“ La knabino logike: „Kial ne levík?“ La patrino kolere: „Ĉar ne!“ La knabino ploreme: „Kial ne?“

Venis frapa argumento...


Mi tute ne kapablis ion fari. En mia cerbo eklumigis fulmo: Kiel mallogika estas ĉiu nacia lingvo, kiel neniu pri tio pensas, kiel perforte gepatroj instruas mallogikon al siaj propraj karaj infanoj, kiel ili instruas ne pensi logike, akcepti senriproĉe komplikaĵojn, kiuj nur konfuzas ĉiujn... jam dum jarcentoj, jarmiloj... Jes, logiko mankas en la socio, logiko kiun elradikigas gepatroj al infanoj, en tempo, kiam ili ne povas rezisti... Malkonscio de tiu fakto baras la homaron evolui...

La dua fulmo, malpli forta venis en mian cerbon: nur esperantisto povas tion kompreni, nur li povas tion eble klarigi kaj pravigi...

Fonto: **Legolibreto 2 de Jindřiška Drahotova**



SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

**TURKA STELO**

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds